


LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Antaŭ 40 jaroj estis
fondita la legenda PSEK
Lu Wunsch-Rolshoven
pri Membronombroj,
agado kaj informado
Esperanto solenita en la
Pollanda parlamento
Aŭstrio, Slovakio kaj
Ĉeĥio kune konferencis
Esperanto-urbo aktivas
Arkones – kulta kaj
kultura
Sergio Pokrovskij pri la
Granda Malordo
Marjorie Boulton
en “Nia Trezoro”
Mo Yan, nobelpremiito
pri literaturo en 2012



2012

11

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №11 (217)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2013

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №11 (217).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 октября 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

En nia gazeto tre malofte aperas tekstoj pli ol dupaĝaj, kaj eble miras, ke kvaronon de l’ novembra *Ondo* okupas sespaĝa artikolo de Sergio Pokrovskij pri la eventoj, kiuj antaŭ 400 jaroj ĉesigis la internan malpacon kaj eksteran invadon en Ruslando kaj metis komencan de la tricentjara relative trankvila evoluo de la lando.

Sed pri tio legu ekde la 12a paĝo. Mi ŝatus atentigi pri alia jubileo. Je unu nulo malpli granda. Ne antaŭ 400, sed antaŭ 40 jaroj en Zakopane estis fondita Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK) – unu el la plej interesaj esperantistaj projektoj. Unue, ĝi estis unu el malmultaj studentaj unuiĝoj esperantistaj. Due, ĝi agis ekster la kadro de la landaj asocioj ĝenerala (PEA) kaj junulara (PEJ). Trie, ĝi funkciis sub la tegmento de la Asocio de Polaj Studentoj kaj utiligis ties eblojn, kiujn ne havis la movadaj organizoj. Kvare, kaj plej grave, PSEK, laŭ sia Deklaro el la 1980a jaro

«... rezignis pri la formalaj Esperanto-movadaj celoj kaj ne provis perfortastile enkondukadi Esperanton en internaciajn studentajn kontaktojn, sed ĝi celis plifaciligi al la pola studentaro apliki Esperanton por kontakti alilingvanojn kaj per tio pliriĉigi la spertojn de la individuoj. Plejparte, la aranĝoj de PSEK karakteriziĝas per tio, ke ili donas laŭeble maksimuman fakan, kulturalan, distran ks. profitojn (depende de sia karaktero) al la partoprenantoj. La propaganda flanko estis malpli atentata laŭ la ideo, ke bonaj altkvalitaj agadoj, kiuj helpas al la certa memevoluo de la individuo, pli efikas ekster la Esperanto-medio ol plej zorga dispropagado».

Tion kaj multon alian rememoris PSEK-aktivuloj en festkunveneto je la 28a ARKONES en Poznano. PSEK ne plu ekzistas, sed ĝia ĉefa renkontiĝo plu okazas kun granda sukceso, danke al la nelacigeblaj PSEKanoj – Paweł Janowczyk, Elżbieta Malik, Zbigniew Kornicki, Ryszard Rokicki kaj multegaj aliaj, kies nomoj okupus ĉi tiun duonpaĝon, se mi daŭrigus listi ilin.

Ili sukcesas, ĉar ili sekvas la ideojn de la Deklaro (1980):

«Por forigi la konflikton inter la oficialaj celoj de la Esperanto-movado kaj la realaj bezonoj de esperantofonoj estas necese:

- konscii, ke la formale deklarataj celoj de esperantismo estas eble atingeblaj sed en nekonata malproksima futuro;
- starigadi antaŭ si celojn realigeblajn en la daŭro de 10 ĝis 15 jaroj, en la daŭro de unu generacio de aktivuloj;
- intensigi laŭkvalitan kontribuadon al la esperantofona “minoritata” kulturo;

- apliki en la Esperanto-movado strategion “per Esperanto por la memevoluo de la individuo” kontraste al “per individuo al la ĉiu-forma peno disaŭdigi Esperanton” – la individuo estu *subjekto*, ne objekto en la movado.

Tio povos ne nur malhelpi seniluziigon de multaj Esperanto-movadaj aktivuloj sed ankaŭ krei ĉe la esperantlingvaj komunumanoj la senton de celkonscia stabiliĝo. Ĉe neesperantista socio ili efikos ĝuste per sia aŭtenteco, kultureco kaj nesintrudado.»

Post 1980 la mondo ŝanĝiĝis, sed la supraj sugestoj plu aktualas...

Aleksander Korĵenkov (PSEK-amiko, invitita al la sekreta kunveneto por malkorki ĉampanon)

Sur la kovrilpaĝo estas monumento al Minin kaj Poĵarskij en Moskvo. (*PressFoto*)

Membronombroj, agado kaj ekstera informado

UEA konstatas pluan malkreskon

Antaŭ kelkaj semajnoj Osmo Buller informis en la publike legebla komitata listo de UEA, ke ĉi-jare estos supozeble ĉ. 400 individuaj membroj malpli ĉe UEA, kaj ke pro tio la jarfina nombro eble restos sub la limo de 5000. Aldoniĝis la alvoko, ke “necesas varbi membrojn, kiom ajn malmoderne tio eble sonas”, dum “komentarioj nun ne helpas”. Regis silento dum kelkaj tagoj, kiun finis Claude Nourmont per la konstato, ke “varbi por varbi” estas “ne tro promesplena afero” kaj ke oni bezonas “proponojn, kiuj povas entuziasmigi la homojn”. Propono por logi Esperanto-parolantojn ne venis, sed iom poste oni ekdiskutis krei membrokategoriojn por eksteruloj ne parolantaj Esperanton, kio trovis iom da subteno.

Eble estas ŝoko, kiam asocio ene de unu sola jaro konstatas malkreskon de la membronombro de 400 el 5300, do perdon de ĉ. 8%. Sed necesas konsideri, ke la membronombroj de UEA forte ondumas depende de la loko de Universala Kongreso, por kiu membroj ricevas altan rabaton. La ĉi-jara UK en Vjetnamio havis kompreneble relative malmultajn partoprenantojn kompare kun eŭropaj kongresoj kaj sekve ankaŭ ne estis aparta instigo membriĝi, kontraste kun la antaŭa jaro, kiam UEA kongresis en Kopenhago kaj konstatis kreskon de 33 individuaj membroj.

Dum la lastaj sep jaroj estis meza malkresko de ĉ. 169 membroj kaj dum la lastaj 25 jaroj, ekde 1987, de mezume 95 membroj jare aŭ -1,6%. Eble ĉe UEA oni alkitimiĝis al tiu konstanta membroperdo kaj sekve aldone al la Ĝenerala Direktoro (kiu devas zorgi pri la financa ekvilibro kaj la salajroj de la dungitoj inkluzive de la propra) ŝajne neniu vere maltrankviliĝis.

Certe ne tro ĝojiga por UEA entute. Kelkaj eĉ kredas, ke la membronombroj de la asocioj estas indiko pri la ĝenerala grandeco de Esperantujo — aserto, pri kiu mi forte dubas. Tro multaj estis en la pasintaj jardekoj la progresoj ekster UEA — ĉe muziko, en ekstereŭropo, ĉe denaskuloj kaj dum la lastaj jaroj plej videble en la interreto. Supozeble nur la procentaĵo de la asociemuloj inter la Esperanto-parolantoj malkreskas. Multaj ne vidas, kial gravus membri en asocio.

Oni povas konstati, ke la membreco ĉe UEA estas ligita al la ricevado de paperaj eldonaĵoj kiel gvidlibro, jarlibro


aŭ revuo *Esperanto*. Tute ĝenerale paperaj gazetoj multe perdis dum la pasinta jardeko kaj devis lasi iom de sia loko al retaj eldonaĵoj. Ĝis nun UEA ofertas neniun nurretan membrokategorion — nek eblas ricevi jarlibron aŭ revuon nur retpoŝte, nek ekzistas kategorio, kiu ebligus nurretan legadon de gazeto aŭ de delegita datumbazo sen ricevo de papera eldono. Osmo Buller skribis, ke “varbado pro varbado” estas baza tasko en organizaĵo — sed organizaj fakuloj asertas ankaŭ, ke organizaĵo adaptiĝu al la daŭre ŝanĝiĝanta mondo. La nunaj membrokategorioj estas la samaj ekde jardekoj.

Rilate al la ligado de homoj al la asocio la reta oferto supozeble ludas gravan rolon. Rimarkindas, ke la Facebook-paĝo de UEA havas ĉ. 3 mil ŝatantojn, dum la ĝenerala Facebook-grupo “Esperanto” nun havas pli ol 10 mil, la duoblon de la individua membraro de UEA. Tiu fakto kaj la multloka videbleco de Esperanto en la reto ankaŭ forigas la tradician argumenton, ke necesas per la membronombroj montri la parolantojn de nia lingvo. Ne plu. Ekzistas tiom da ofertoj en la reto, ke evidentas, ke ili havas siajn uzantojn — Vikipedio, Firefox, Google Translate, Tatoeba, subtekstigitaj filmoj kaj TED-prelegoj, filmetoj, kantoj ktp. Eble Esperantujo pli kaj pli alproksimiĝas al la stato de naciaj lingvoj, kie membras en lingvo-asocioj nur malgranda elcentaĵo de la parolantoj (ĉ. 1 el 2000 en Germanio). En Litovio kaj Hungario ĉ. 1 el 30 ĝis 50 Esperanto-parolantoj nombritaj en la censoj estas Individua Membro de UEA, do ankoraŭ multe pli ol ĉe naciaj lingvoj...

Sed eble oni devas aliĝi al UEA por vivteni la Universalan Kongreson, ĉu? Nu, la UK-oj estis organizitaj jam antaŭ la ekesto de UEA kaj certe troviĝos organizaj modeloj ankaŭ kaze ke UEA tion ne plu aranĝos. Simile pri la libroservo. Aliaj argumentas, ke necesas havi internacian reprezentanton de Esperantujo. Ne ĉiuj estas plene konvinkitaj pri tio, sed evidente eblas paroli en la nomo de ĉiuj Esperanto-parolantoj ankaŭ, se membras nur dekonono de ili.

Eble ni rigardu la komencon de UEA — laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* la kerna celo estis “la plifaciligado de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj”. Hodiaŭ tio ŝajne funkcias eĉ sen asocio.

Mia iama espero pri membreco estis, ke la asocioj sukcesas “disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto”, kiel tekstas la unua laŭstatuta celo de la nuna UEA. Bedaŭrinde tio ne funkcias kaj ne videblas evoluo en tiun direkton. Oni povas demandi sin, kio pli zorgigu nin: La meza malkresko de 1,6% de la membroj jare aŭ la fakto, ke UEA, kiu havas jaran buĝeton de duonmiliono da eŭroj, ŝajne uzas nur ĉ. 10 mil eŭrojn por ekstera informado. Iom malmulte, se oni atente relegas la cititan laŭstatutan celon de UEA.



Lu Wunsch-Rolshoven



Esperanto en la Pollanda Senato

La 125-jariĝo de Esperanto estis solenita la 17an de oktobro en Senato de Pollando (la supera parlamenta ĉambro) per tri sinsekvaj eventoj: fonda kunveno de la Parlamenta grupo por subteno de Esperanto, ekspozicio pri la Internacia Lingvo, kaj konferenco “125 jaroj de Esperanto”.

La ekspozicion malfermis Jan Wyrowiński, vicprezidanto de Senato, kiu emfazis, ke Ludoviko Zamenhof venis al la ideo de Esperanto pro la multkultureco de Bjalistoko, en kiu tiam loĝis judoj, poloj, germanoj kaj rusoj. Ankaŭ Wanda Nowicka, vicprezidantino de Sejmo (la dua parlamenta ĉambro) esprimis sian kontentecon pro la konstanta evoluo de Esperanto.

La ekspozicio kaj la konferenco estis pretigitaj de la Pollanda asocio Eŭropo-Demokratiio-Esperanto (EDE-PL). La konferencanoj parolis, interalie, pri la entrudiĝo de la angla lingvo en Eŭropo, kio senmerite privilegias 13 procentojn da eŭropanoj, kiuj estas denaske anglalingvaj, kaj diskriminacias 87 procentojn da ceteraj eŭropanoj.

Estis menciite, ke Pollando, kiel la naskiĝlando de Esperanto, povas promocii Esperanton kiel parte oficialan lingvon en la Eŭropa Unio, kun statuso simila al tiu de la lingvoj kataluna, eŭska, kimra kaj skota.

Senatano Edmund Wittbrodt, subteninte la formiĝon de la parlamenta Esperanto-grupo, proponis, ke oni preferu ne oponu la anglan lingvon, sed kuraĝigu la instruadon de Esperanto. Eksa parlamentano Tadeusz Iwiński atentigis pri problemoj de popularigado de Esperanto, kiu apartenas al neni ŝtato aŭ interŝtata organizo, kaj pledis por restarigo de la Esperanto-programo en la Pola Radio.

En la konferenco partoprenis pluraj parlamentanoj, sciencistoj, kaj Pollandaj kaj alilandaj esperantistoj, inkluzive de la japana entreprenisto Etsuo Miyoshi, konata mecenato kaj propagandisto de Esperanto.

(Laŭ <http://www.senat.gov.pl>)

Trilanda konferenco

Inter la 27a kaj la 30a de septembro kunvenis en la ĉeĥa urbo Břeclav esperantistoj aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj, por komune konferenci; kiel gastoj venis partoprenantoj el Germanio, Hungario, Pollando kaj du eĉ el Brazilo, sume 98 personoj. Aŭspicion akceptis la urbestro d-ro Oldřich Ryšavý, dank’ al kiu povis realiĝi esperantlingva versio de la oficiala urba retejo, kaj la loka ĵurnalo informis pri la konferenco.

Dum la vespera programo Peter Baláž skizis la laboron kaj planojn de la teamo E@I kaj raportis pri ĉi-jara Somera Esperanto-Semajno en Nitra. Sekvis ekzemploj de mallongaj filmetoj kun esperantlingva komento aŭ subtekstoj. La tagon fermis komuna kantado en klubejo de la studenthejmo.

La vera konferenco komenciĝis vendrede. La urbestro salutis la partoprenantojn kaj per lumbildoj prezentis la urbon kaj la regionon, sed lin atendis surprizo — filmeto pri lia urbo kun esperantlingvaj subtekstoj. En la sekva programero “La tri Esperanto-landoj prezentigaŝ” reprezentantoj priskribis la situacion de Esperanto en siaj landoj.

Posttagmeze duono da konferencanoj forveturis buse al la proksima kastelo Lednice, la plej bela moravia kastelo kun granda ĉirkaŭanta parko.

La vesperan programon malfermis loka folkloro infana ensemblo *Břeclavánek*. Sekvis prelega vespero. Paŭlo Kaščák prezentis la novan radiostacion *Verda Stacio*, kiu klopodas daŭrigi tradicion de iam tre populara *Verda Stacio* en Brno (1933-37) kaj Prago (1946-51). La tri ĉeestantaj eldonistoj (Peter Baláž,

Petr Chrdle, Stano Marček) prezentis novaĵojn de siaj eldonejoj. Ankaŭ ĈEA montris sian kompaktan diskon de voĉlegataj rakontoj de Karel Čapek. Miroslav Smyčka kantis la ĥoralon *Sankta Venceslao* el la 11a jarcento kaj deklamis *Romancon pri Karolo la IVa* de Jan Neruda en traduko de Miloš Lukáš.

Sabate matene la tri asocioj en apartaj ĉambroj diskutis siajn organizajn aferojn, precipe la membrobazon kaj ekonomiajn problemojn.

Vespere kunvenis Esperanto-instruistoj sub gvido de Maria Feifčová kaj la tri asociaj komitatoj. Paralele okazis konversacia kurso. En komuna programo en granda salono Margit Turková prezentis la vivon de la ĉeĥa ĵurnalisto kaj satira poeto Karel Havlíček Borovský. La slovakaj grupo simile skizis la vivon de pastro Ján Maliarik (1869-1946), kiu en sia libro *La tuttera ŝtato* kalkulis kun Esperanto. Poste ili projekciis kortuŝan, profesie aktoritan filmon pri ĉi tiu apostolo de paco.

La dimanĉa programo estis denove komuna sub titoloj “Vojoj al kunlaboro kaj perspektivoj. Invito al interretaj projektoj” (Vikipedio, Ipernitio, sonprojektoj), “Studu interrete!” (Lernu.net, Slovaĉe.eu). Ján Vajs prezentis prelegon “Surspuro de habanoj en Ĉeĥio, Slovakio kaj Aŭstrio”. La habanoj estis antikva etno vivanta en tiu regiono, kie la tri landoj najbaras, restis post ili “habanaj ceramikaĵoj”. Skizitaj estis eblaj kunlaboroj pri aranĝoj (KAEST, SES, Muzea nokto), kunlaboro de Esperantomuzeoj, interŝanĝo de ekspozicioj, komuna prezento de literaturoj en interreto aŭ kompaktdiske.

Miroslav Malovec

Ekskursa grupo en la kastelo Lednice (Fotis: Pavla Dvořáková)



En la Esperanto-urbo

En la Esperanto-urbo Herzberg am Harz konstante okazas io favora por Esperanto. Ofte venas gastoj el diversaj landoj. En la baza kaj meza lernejoj kaj en la gimnazio instruas Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka. Regule okazas klubkunvenoj.

En julio 2012 vizitis nin la parolantino de EU en Berlino, deputitino Viola von Cramon. Multaj regionaj politikistoj kaj esperantistoj ĉeestis. Al ĵurnalistoj ŝi diris, ke la Esperanto-Centro estas “diamanto por la Sūdharz-regiono”.

Intensa kursaro

En julio okazis dusemajna somera Esperanto-kursejo, kiu ofertis intensan lernadon, entute 125-horan programon en la 125a jaro de Esperanto. La lernado okazis en grupoj laŭ lingva kapableco sub gvido de Peter Zilvar, Christof Krick, Sebastian Kirf kaj Zsófia Kóródy. La biblioteko de ICH (Interkultura Centro Herzberg) ofertis bonan bazon por praktika laboro kaj memlernado. La kursanoj ankaŭ ĝuis ekskursojn, kaj komunaj amuzan vesperan distraĵon.

Jubilea Festo

La 26an de julio Gerhard Walter, la urbestro parolanta Esperanton, kune kun estraranoj de Germana Esperanto-Asocio kaj de la Esperanto-Societo Sūdharz inaŭguris la ekspozicion “125-jara Esperanto” en la konstanta Esperanto-ĉambro de la bela kastela muzeo.

Posttagmeze kaj vespere okazis festo en la Esperanto-ĝardeno de ICH. La honora gasto estis Gerhard Walter. La nova muzikgrupo *Senlime* kantis en la angla, germana, kaj same kompetente en Esperanto. La bonaj voĉoj, ekzemple la belsona jodlado de la kantistino Kerstin, estas unikaĵo por la Esperanto-publiko.

Gulaŝo sur bivakfajro laŭ la hungara maniero kaj aliaj bongustaĵoj garantiis belan vesperon je la memorinda dato por Esperanto. La gravecon de tio montras la interesiĝo de la gazetaro — ekzemple, artikolo kaj fotoserio en la fama retgazeto *Spiegel online* — kaj apero de filmreĝisoro de renoma germana televidkompanio.

Hotelo, kafejo, restoracio

Same en julio okazis inaŭguro de la esperantlingva hotelo *Zum Pass* en Herzberg-Sieber, kiun posedas la esperantistinoj Barbara Khan kaj Teresa Liberska el Poznano, kiuj nun vivas en Sieber — urboparto de la Esperanto-urbo. Ĉi tiu hotelo havas Esperanto-kafejon kaj restoracion, kie oni povas mendi bongustaĵojn en Esperanto.



Ewa Kukielka instruas novajn vortojn

Esperanto-herbejo

Nova Esperanto-ŝildo estis inaŭgurita sur montoflanko proksime al la Esperanto-Centro, en ĝardeno, kie kreskas fruktarboj kaj arbustoj. Laŭ la planoj ekde la sekva jaro la herbejo povos servi kiel tendumejo por Esperanto-amikoj.

Somera Arbara Lernejo

La sepa Somera Arbara Lernejo por gejunuloj el la ĝemelurboj Herzberg kaj Góra, ĉi-jare estis organizita la 4–11an de aŭgusto en Jemiłno kaj Góra en Pollando. Zsófia Kóródy kaj Renata Kowalska kun helpantinoj gvidis ĝin. En la programo antaŭtagmeze estis kvarhora Esperanto-instruado kaj posttagmeze komunaj ludoj aŭ ekskursoj. Kelkaj partoprenantoj jam plurfoje spertis la bonetason de tiuj renkontiĝoj, kaj ilia lingva nivelo pliboniĝas de jaro al jaro.

Tradukseminario

Teorio kaj praktiko kune: la tradukteamo de la projekto “Nacia Parko Harz” la 13–16an de septembro diskutis pri fakterminoj, serĉadis taŭgajn vortojn en la vortaroj kaj faklibroj de la Esperanto-biblioteko de ICH. Aldoniĝis praktika parto: ni vizitis kelkajn partojn de la Nacia Parko por vidi la lokojn, konatiĝi kun la belaj de tiu regiono kaj atingi la supron de la monto Brocken (1142 m).

Eŭropa Tago de Lingvoj

ICH okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj organizis diskutrondon pri lingvaj demandoj kaj lingva demokratio. La anoncitaj eventoj aperis ankaŭ sur la oficiala hejmpaĝo de la Konsilio de Eŭropo. Peter Zilvar prelegis pri minoritataj lingvoj en speciala klubkunveno, en kiu partoprenis klubanoj kaj gastoj el eŭropaj kaj aziaj landoj. Ni traktis ankaŭ

la lernfacilan rolon de Esperanto, komparante similecojn kaj malsimilecojn de niaj gepatraj kaj lernitaj lingvoj. La Tago de Lingvoj estis temo dum kurso de Zsófia Kóródy en la Popola altlernejo KVHS en Osterode. Okaze de la Tago estis publika evento ankaŭ en la regiona gimnazio kun ĉeesto de la direktoro, instruistoj kaj lernantoj.

TORPEDO 8

Ekde la 28a de septembro ĝis la 3a de oktobro okazis la 8a Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia kun prezentado de interesaj el la pedagogia-metodika temaro de Esperanto-instruado kaj spertinterŝanĝo inter fakuloj. Zsófia Kóródy kaj Christof Krick prezentis du lerneajn Comenius-projektojn, en kiuj ankaŭ lernejoj en Herzberg respektive Winterberg kunlaboras. Kun aliaj partoprenantoj ekestis diskutrondo pri sciencaj revuoj kaj faka tradukado.

La dua traktita ĉeftemo rilatis al la 125-jara historio de Esperanto. Peter Zilvar prezentis ĝin el la vidpunkto de kolektanto kaj montris unikaĵojn pri Zamenhof, kongresoj kaj aliaj gravaj eventoj, bildkartojn, medalojn, poŝtkartojn kaj glumarkojn. La partoprenantoj, inter ili Reza Torabi kaj Brian Moon, povis konatiĝi kun la valora materialo kaj la aktualaj arkivigaj laboroj de ICH.

Esperanto-urbo kaj ICH ĝojos pri via vizito, ekzemple, dum la 57a Studsesio kun Zamenhoffesto la 14–16an de decembro kaj dum SANO 3, la alternativa jarŝanĝa seminario kun silvestra balo.

<http://esperanto-urbo.de>

✉ DE-37412, Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6, Germanio.

Zsófia Kóródy



Krio de Morto post kelkjara paŭzo brue reaperis en Arkones (Fotis Žaneta Nowak)

ARKONES: Kulta kulturaranĝo

Pasis nur kelkaj jaroj post translokigo de Arkones al la Fervojista domo ĉe la strato Niepodległości en Poznano, sed la loko jam fariĝis kara kaj preskaŭ tradicia por ĉiujaraj partoprenantoj de la aranĝo. La pola nomo de la strato signifas “Sendependeco” kaj ĝi ideale kongruas kun la etoso de la ARTaj KONfrontoj en ESperanto. Temas pri la sento, kiu okulfrapas (kaj orelfrapas!) tuj kiam oni eniras la kongresejon — de libera, senĝena kaj vasthorizonta arta sinesprimo — kompreneble en Esperanto, sed ne nur pri ĝi. La festivalo laŭ sia enhavo klare dividiĝas al prelega kaj vesperprograma partoj. Kvankam la vespera programo estas tradicie rigardata kiel pli grava, laŭ mi, ambaŭ ili meritas pli detalan trarigardon.

Prelegoj (da ili en la 28a ARKONES estis pli ol 20) temis ĉefe pri literaturo, poezio, strukturo de Esperanto aŭ Esperanto-movado, vaste komprenata. Kelkaj submetiĝas al ĉiuj tiuj kategorioj samtempe (ekzemplo: *Prezentiĝo de Esperanto eldonejoj, gazetoj kaj radioj*). Ne mankis prelegoj landsciencaj kaj privojaĝaj (unu el la plej interesaj por mi estis *La nuntempa Brazilo*, pliproksimiginta al mi tiun foran de Eŭropo landon).

Dum la taga programo troviĝis loko ankaŭ por teatraj kaj filmaj spektigadoj. Nekutima miksiĝo de la du ĝenroj estis multimedia unuaktora spektaklo *Galileo* de Saša Pilipoviĉ, preskaŭ rekte aludanta al la situacio kun Esperanto kaj komparanta porveran batalon de Galileo kun niaj penoj diskonigi la Lingvon Internacian. Eĉ pli grandan favoron de publiko elvokis la teatraĵo *Historio de*

Universalaj Kongresoj de Esperanto de Saša Pilipoviĉ kaj Georgo Handzlik. Kompareblan sukceson atingis premiero de la nova verko de renoma reĝisoro Roman Dobrzyński — filmo pri estado de Ludoviko Zamenhof en la 1912a jaro en la germana kuracurbeto Bad-Salzburg (nun: Szczawno-Zdrój en Pollando) kaj pri nunaj iniciatoj de lokaj esperantistoj en tiu Zamenhof-loko.

La vesperaj programoj abundis je koncertoj. Dum la malferma vespero aŭskultantojn lirike enmeditigis Georgo Handzlik, kaj poste JoMo senkomplete dancigis ilin per siaj klasikajoj. La dua vespero devis esti pli ekzota — vizitantoj de Arkones atendis la regean Zhou-Mack kaj la inferan *Krio de Morto* (ŝajnas, ke la organizantoj celis ĉi-vespere kapti publikon per stila kontrasto). Bedaŭrinde, Zhou-Mack ne aperis en Poznano, kaj *Krio de Morto* devis krikantadi ĝis la lasta bis-kanto — malgraŭ la muziko, nekutime “peza” por Esperantujo, la koncerto kolektis multajn muzikemulojn.

Arkones estis kaj daŭre restas unu el la plej unik-etosaj esperantistaj renkontiĝoj — artaĵoj, pendantaj surmure en la koridoro, kafotabletoj, ĉe kiuj vigle interparolas Esperanto-kantistoj, Esperanto-aktoroj, Esperanto-eldonistoj kaj “konsumantoj” de ilia laboro. Eĉ la fakto, ke dum ĉi-jara Arkones funkciis tri (!) libroservoj, klare montras la intelektan kaj kulturen nivelon de la aranĝo (ne ĉiu esperantista renkontiĝo havas almenaŭ unu!). Mi esperas, ke tia vizitindaĵo, kia Arkones, daŭre kreskos je nombro de kultursoifaj partoprenantoj, interesaj prelegoj kaj kvalitaj koncertoj.

Konstantin Tiĥomirov

Eventoj

La 15a studjaro ĉe UAM

Por tiuj, kiuj studas ĉe la interlingvistika fako de UAM (Universitato Adam Mickiewicz), la tria semajno de septembro signifas surlokan sesion en Poznano. Tiujn, kiuj volas sperti riĉan internacian kulturen programon dum la semajnfino, Arkones (jam la 28a!) allogas.

Ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM komenciĝis la 15a studjaro: la dua jaro de la kvina grupo. La persistaj partoprenantoj alvenis el pluraj landoj (Hungario, Svislando, Germanio, Ruslando, triopo el Pollando kaj kvaropo el Brazilo).

Kiel kutime okazis kvar kursoj: pri interlingvistiko prelegis Věra Barandovská (al la elstara kaj sindediĉa interlingvistino la grupo gratulis pro ŝia jubileo), István Ertl prezentis la Esperanto-literaturon de la 3a periodo, Michael Farris traktis semantikon kaj morfologion, kaj Ilona Koutny okupiĝis pri la Esperanta sintakso. Post la merkredaj ekzamenoj dum la komuna vespero kelkaj prezentis propran aŭ tradukitan verkon.

Prof. **Ilona Koutny**, akademiano, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

ĈESAT 2012

La ĉi-jaran tradicion (inventitan en 1989 de Hoffmann kaj Smyčka) ĉeliman renkontiĝon Ĉeĥa-Saksa Tago la 3an de oktobro en la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵo de la kuracloko Bad Schandau (Saksa Svislando) partoprenis 3 ĉeĥoj kaj 16 germanoj.

Ni vizitis la tre interesan dulingvan ekspozicion en Nationalparkhaus (domo de la nacia parko), vidis tie la plej novan filmon pri la belecoj de tiu nacia parko. Poste ni tagmanĝis tie kaj havis kunsidon kun prelego de Karel Votoček pri biciklado apud la rivero Elbo kaj amuzrakonton pri la patro kaj filo de Irmgard Bärenz kaj prezentado de bildserioj: unue pri la urboj laŭlonge de Elbo, senditan de Josef Kříž, kaj de pliaj fotoj el Svislando kaj Francio prezentitaj de Frank Nietzsche.

Posttagmeze ni ekskursis al novkonstruita belvidturo en Rathmannsdorf, de kie ni povis ĝui dum tre agrabla vetero la belegan aŭtunan pejzaĝon kun imponaj montoj ĝis la limregiono de Ĉeĥio. Fine ni kunsidis, babilante ĉe kafo kaj kuko, aŭ ankaŭ bongusta biero en la ĉestrata vilaĝa gastejo Heiterer Blick (Gaja Elrigardo).

Samriveranoj: **Frank Nietzsche** (Germanio), **Karel Votoček** (Ĉeĥio)

Tra la Respubliko “Botelkolo”

Vi ne scias kie situas tiu respubliko? Tiam vi verŝajne ne apartenis al la dudek sep esperantistoj el kvar landoj, kiuj partoprenis la 2an Esperantistan Migradon Aŭtunan (2a EMA). Ĉi tiu aranĝo de la Germana Esperanto-Asocio (GEA) okazis de la 30a de septembro ĝis la 5a de oktobro.

Sub la aŭtuna suno de la meza Rejnlando la grupo migris sub lerta gvidado de Rudolf Fischer. De Kaub en kvar etapoj la grupo iris al Rüdeshheim, ĉiam sur la fama kaj intertempe tre populara migropado “Rheinsteig”, renkontante la belegajn panoramojn, imponajn burgojn kaj multkolorajn vitejojn. Ofte la internacia grupo renkontis vinberrikoltantojn, de kiuj ili ricevis kelkajn berojn por gustumi.

Vidinte la verdajn flagojn ĉe la grupo kaj aŭdinte “iun strangan lingvon”, preterpasantoj alparolis la grupon kaj montris intereson pri nia lingvo. Ne malofte anoj de la grupo “ofertis” survojan kurseton pri la lingvo.

Vespere la partoprenantoj de la 2a EMA aŭskultis prelegojn de Petro Chrdle kaj Rudolf Fischer. Chrdle prelegis pri sia libroeldonejo KAVA-PECH kaj pri la vivo de la fratoj Karel kaj Josef Čapek. Fischer raportis pri siaj spertoj sur la Jakoba Vojo en Hispanio. Samtempe ni povis ĝui la belan noktan panoramon desur nia tranoktejo, Elsenburg en Kaub.

Fine mi volas solvi la enigmon pri la respubliko Botelkolo (Germane: *Freistaat Flaschenhals*).

Post la unua mondmilito la venkintoj kreis trans Rejno du “pontkapojn” inter Koblenco kaj Majenco de la maldekstra Rejna bordo, okupita de Francujo, kaj la maldekstra riverbordo administrata de la Vajmara Respubliko, kun radiuso po 30 kilometroj. Inter ambaŭ restis neokupita tereno en formo de botelkolo sen rekta ligo kun la cetera Vajmara Respubliko. La homoj en tiu landstrio administris sin memstare de januaro 1919 ĝis februaro 1923. La botelkolanoj relative bone vivis en tiu “libera ŝtato” vivtenante sin ĉefe per kontrabandado inter la franca okupata zono kaj la Vajmara respubliko. Hodiaŭ ekzistas vigla iniciato de homoj kaj entreprenoj, kiu uzas tiun “markon” en turismo.

La venontjara tria EMA tre verŝajne okazos ĉe Mozelo apud Zell. Ni jam fiksas la datojn: de la 6a ĝis la 11a de oktobro 2013.

Wolfgang Bohr



Starbicikle tra Strasburgo

Esperanto-Kulturtago 2012

La 22an de septembro en Verden okazis la Esperanto-Kulturtago 2012 de EMAS, la landa Esperanto-ligo en la Malsupra Saksio.

La renkontiĝo komenciĝis en la “bistrot” de s-ro Sottorf kun prelego de Andreas Kück pri la Itala Esperanto-Kongreso en Mazaradelvalo sur la insulo Sicilio. Poste Andreas kaj Heinz prelegis pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Galvio en Irlando (kun multaj bildoj). Krome la libroservo de Rolf Beau estis je la dispo de la partoprenantoj je favoraj prezoj.

Je la 11a komenciĝis ekskurso tra la urbo kun s-ino Schwabedissen de la turist-informejo de Verden. Ni rigardis la internon de la katedralo kaj la korton de la katedralo kun la t. n. ŝtona viro en la ekstera muro de la katedralo. En Verden troviĝas multaj historiaj domoj, plej ofte en sufiĉe bona stato. Ni piediris tra la historia suda parto de la urbo kun la katedralo. En la stratoj estas ankaŭ modernaj artaĵoj, ekzemple fontanoj. Apud Aller troviĝas monumento por John Lennon, kiu ludis rolon en filmo kiu estis produktita i. a. en Verden.

Post la tagmanĝo ni vizitis la germanan Ĉeval-Muzeon kun granda kolekto de montraĵoj pri la ĉevalo el diversaj vidpunktoj (biologio, kuracado, metio, ekonomio, armeo kaj sporto). Post la vizito en la ĉeval-muzeo okazis la adiaŭa kafumado en la najbara Esperanto-centro proksime de la stacidomo.

Feliĉe pluvis nur dum la tagmanĝo kaj dum la vizito en la muzeo. Tiel la pluvo ne ĝenis nin.

Thomas Heberlein

Eventoj

Starveturilo kaj ŝaŭmkisoj

“Esperanto — lingvo kaj pli” estis la moto de la 34a BAVELO-Seminario, al kiu invitis Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo kaj Orientfranca Esperanto-Federacio je la 21–23a de septembro 2012.

La loko de la seminario estis Ortenberg, vilaĝo ĉe la okcidenta rando de la Nigra Arbaro. Gastigis la partoprenantojn la tiea junulargastejo, fama pro la situo en pitoreska, novgotika kastelo el la 19a jarcento. Perfekta kuliso por semajnfino kun bunta bukedo el klerigaj kaj distraj programeroj por la preskaŭ 40 seminarianoj venintaj ĉefe el Francio kaj Germanio.

Pri la komencantoj lerte zorgis la konata Cseh-instruistino Tereza Kapista el Beogrado, kiu en aparta vespera prezentado ankaŭ rakontis pri siaj multaj vojaĝoj tra la mondo.

Laurent Philippe gvidis paroligan kurson por progresintoj, diverstemaj kaj diskutigaj prelegoj allogis la “spertulojn”. Interalie, Manfred Westermayer informis pri “Stuttgart 21” — multe pridisputata, grandega konstruprojekto en Germanio; kaj Frank Huber per “Segway, la starveturilo” prezentis diversajn flankojn de tiu nekutima transportilo.

Bonan eblecon por babili, amikiĝi kaj samtempe iom esplori la ĉirkaŭaĵon ankaŭ ĉi-jare donis la turisma parto de la seminario. Krom granda muzea bieno en la Nigra Arbaro ankaŭ la historia urbocentro de la nefora Strasburgo estis celo por ekskursemuloj.

En Strasburgo kelkaj grupanoj kaptis la okazon por unika sperto kaj Segway-veturile esploris kvartalon de la urbo. La distran parton de la semajnfino kompletigis gvidado tra la areo kaj konstruaĵoj de la seminariejo, Kastelo Ortenberg. Ĉambelano en historia vesto konatigis al la vizitantoj okazintaĵojn, personojn kaj vivkutimojn el antaŭaj jarcentoj.

Orkestra grupo, kiu samtempe restadis en la junulargastejo, montris intereson pasigi komunan duonan horon por sin prezenti unu al la alia. Ludadon de kelkaj muzikaĵoj oni reciprokis per 125 ĉokoladaj ŝaŭmkisoj, kiujn oni kune frandis okaze de la jubilea jaro de Esperanto.

Gajaj tagoj kun abunda programo en bela loko, jen ebla resumo pri semajnfino, kiu certe ankoraŭ longe restos en ĉies memoro.

Frank Huber

La 16an fojon en Pluezek

En la 16aj Esperantaj Renkontiĝoj, okazintaj fine de aŭgusto en Pluezek (Francio) kun cento da partoprenantoj, ni konatiĝis kun du novaj eksterlandaj esperantistoj.

La juna brazilano Igor prelegis pri sia kelkmonata restado en Bretonio kaj pri sia estonteco. Razen, nepalano el Katmando, prelegis pri sia lando Nepalo, en kiu estas 60 etnoj, kiuj parolas pli ol 120 lingvojn. Ili vekis intereson de ĵurnalistoj, kaj kelkaj gazetoj kaj unu televido aperigis interesajn intervjuojn kun ili kaj informis pri Esperanto.

En diligenta etoso, disvolviĝis la sep diversnivelaj kursoj, kaj 12 staĝanoj kuraĝis trapasi diversgradajn ekzamenojn. Regis ne nur la studa etoso, sed ankaŭ la feria. En la atelieroj Elinjo prezentis diversajn esperantajn ludojn: ludkartoj pri la memoro, pri gramatiko, ludoj por enkapigi la numeralojn...

La bela vetero favoris turismon. Ni vizitis la pluezekajn klifojn, la muelilon de Kraka, la templon de Lanleff, la kapelon de Kermaria, la abatejon de Bopor, la islandan muzeon, la skulptaĵojn de Marie...

La busa promenado kondukis nin al Cavan, kie ni atingis la “muzikan padon” de la soncentro. Tie, en arbara valo, laŭlonge de la rivero Le Jaudy, kie vivas kelkaj strangaj estaĵoj, la unua grupo promenadis spertante la diversajn dismuntitajn sonilojn. Dume la dua grupo malkovris la abelbredadon kaj gustumis diversajn mielospecojn, ankaŭ la faman bretonan medon “chouchenn”.

La juna pluezeka muzikisto Yelane prezentis famajn francajn melodiojn kaj aludis Esperanton pere de Esperantaj kantotradukoj de Georges Brassens. Alia invitito, la desegnisto Stephane Le Marchand, humure karikaturis staĝanojn.

Lundovespere, nia salono estis apenaŭ sufiĉe vasta por akcepti la bretonajn dancantojn ĉar, kiel kutime, ni larĝe malfermis la pordojn al la publiko. Jean Claude, nia prezidanto invitis tutan amikan skipon da muzikistoj, kiuj majstre kaj tradicie dancigis la ĉeestantojn. Por kunigi utilecon kaj agrablecon, la kuirista skipo proponis bretonajn cidron kaj krespojn.

Dum la semajno alternis gajaj kaj seriozaj vesperaranĝoj. Merkrede ni kantigis la ĉeestantojn. Vendrede okazis adiaŭa vespero. Ĉiuj atelieroj prezentis sian laboron: teatro, kantoj. La kuirista skipo regalis nin per siaj olimpikaj ludoj.

Jeanne Pouhaer



Alytus: Mindaugas žuromskas parolas en la malfermo de la ekspozicio “Esperanto 125”.

Esperanto en Litovio

La 4an de oktobro en la biblioteko Jurgis Kunčinas en la litovia urbo Alytus estis inaugurita ekspozicio “Esperanto 125”. La ekspozicion organizis kaj prezentis d-ro Gediminas Degėsys kaj studento Mindaugas žuromskas el la Vilna Universitato. La organizadon financis arkitekto Vytautas Lukoševičius el Vilno. Antaŭ la malfermo de la ekspozicio, pri ĝi kaj pri la Internacia Lingvo estis farita 20-minuta radioelsendo, kiun en la radio FM99 gvidis Aušra Plonytė.

La 11an de oktobro en la Esplora Instituto Pri Litovia Kulturo en Vilno okazis konferenco “Kulturo, arto kaj religio en la juda vivo en Litovio”. En la konferenco d-ro Degėsys prelegis pri la temo “Graveco de Zamenhofa idearo en multlingva mondo”.

Gediminas Degėsys

Sinjorino Esperanto

En la ĉefurbo de D. R. Kongo la 12–14an de oktobro okazis la 14a pintokonferenco de Frankofonio (Franclingvujo).

Kadre de la kultura programo aktivulinoj de KEVA (Konga Esperanta Virina Asocio) kaj de la virina asocio pri publika administrado prezentis teatraĵon kun la lingva poemo *S-ino Frankofonio*, kiun verkis la prezidantino de KEVA Nelly Masemi. La kvar naciajn lingvojn (lingala, kikonga, svahila, ĉiluba) kaj la tri internaciajn lingvojn (franca, angla, Esperanto) personigis virinoj, kiuj montris la kulturan kaj lingvan diversecon. La prezidantino de KEVA havis la rolon de s-ino Esperanto. KEVA-anoj ankaŭ distribuis Esperanto-afiŝojn.

Vanessa Kapenga

Plia omaĝo al Tibor Sekelj

La deka Renkontiĝo de Esperantaj verkistoj okazis la 14–16an de septembro en la nord-kroata vilaĝo Hraščina en la bieno de Spomenka Štimec. Ĉi-jare la ĉefa temo estis la verkisto kaj esploristo Tibor Sekelj, okaze de la centjariĝo de lia naskiĝo.

La verkaron de Tibor Sekelj prezentis lia vidvino Erzsebet Sekelj, kiu parolis pri la plej gravaj el 80 libroj de Tibor Sekelj. Ŝi rakontis, ekzemple, ke estis publikigitaj 300 mil eksempleroj de la japana traduko de lia romaneto *Kume-aŭaŭa, la filo de la ĝangalo*.

Anne Jausions prezentis problemojn de la tradukado de la sama libro francen. Zlatoje Martinov rakontis pri Tibor Sekelj kiel poeto kaj analizis universalajajn en lia poezio. La ĉeestantoj aparte profitis per la programo de Kroata TV, kiu speciale disponigis kopion de la TV-programo pri Tibor Sekelj el 1982.

Kvindeko da kroataj kaj slovenaj esperantistoj ĉeestis la renkontiĝon. Finance subtenis ĝin Ministerio pri kulturo de Kroatio kaj aŭspiciis Akademio Literatura de Esperanto, kiu evoluis el Esperantlingva Verkista Asocio, kiun Sekelj kunfondis en Budapeŝto en 1983.

Spomenka Štimec

Brazilo: Ago-tago

En Brazilo Ago-tago okazas dufoje en la jaro, nome en marto kaj en oktobro. Esperantistoj de Rio-de-Ĵanejro la 6an de oktobro iris en la urbocentron por disvastigi Esperanton.

Elektita estis Largo da Carioca, regiono kun granda alfluo da homoj. Ĉe la krado de la Monaĥejo de Sankta Antonio, Kultura Kooperativo de Esperantistoj improvizis ekspozicion kun Esperantaj libroj, gazetoj kaj muzikaĵoj el pluraj partoj de la mondo. Unu kolora rubando kun la nomo de la idiomo etendiĝis tie. La alparolintaj piedirantoj ricevis informojn kaj informan materialon. Centojn da flugfolioj oni disdonis.

Pri la kunordigo respondicis la radioparolisto Givanildo Costa. Granda parto de la publiko evidentiĝis nesciadon de la temo. Multaj tamen tuj pasis de tuta nekonado al subteno al la afero. Aliaj, kiuj diris, ke ili konas la lingvon, montris admiron je la idealoj kaj je la riĉeco de la esperantista kulturo. Inter tiuj, multaj asertis, ke ili aŭskultas la programon “Esperanto, la Lingvo de Frateco” de la Radio Rio de Janeiro.

Fabiano Henrique



Anni Brandt gvidas tra la domo de Anni Blomqvist (Fotis Robert Bogenschneider)

Finlando: belaj kaj sukcesaj Aŭtunaj Tagoj en insularo

Esperanto-Asocio de Finnlando havis belajn kaj sukcesajn Aŭtunajn Tagojn la 14–16an de septembro en la insularo Alando. Ĉestis entute 36 partoprenantoj, inter ili naŭ personoj el Svedio kaj unu el Bruselo.

Ni havis en la unua tago viziton al la memregada domo de Alando kaj en la sekva tago tuttagan ekskurson kiam ni vidis multege la insularon, interalie la domon de Anni Blomqvist (1909–1990), kie nun estas muzeo kaj esplorista rezidejo. Blomqvist estas la plej vaste konata verkisto el la Alanda literaturo, ankaŭ en la kontinenta finlingva Finnlando, ĉefe pro la romanserio *Maja de la Ŝtorma insulo*.

Estis disdonitaj diplomoj al partoprenantoj de KER-ekzameno. Dimanĉe kelkaj vizitis la muzeojn en la ĉefurbo Mariehamn. La reenvojaĝo komenciĝis posttagmeze al Finnlando kaj al Svedio.

Tiina Oittinen, Tuomo Grundström

Rumanio: Tutlanda simpozio pri Esperanto kaj edukado

La 5–7an de oktobro la rumanaj esperantistoj kunvenis por tutlanda Esperanto-simpozio en Răscruți (Cluj). Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 40 personoj, inter kiuj gastoj de Hungario kaj Serbio. La temo de la simpozio estis *Esperanto kaj edukado* kaj gvidis ĝin Aurora Bute.

La unua parto de la simpozio, *Edukado pri Esperanto*, enhavis prelegojn pri diversaj temoj ligitaj kun Esperanto: “La kurso E-125” (Stefan MacGill), “La mondo laŭ la vizioj de Zamenhof kaj Martinus” (Mihai Trifoi), “La Esperanto-movado en Transilvanio ĝis la unua mondmilito” (Marian Vochin), “La projekto Comenius” (Mariana Berariu), “Universalaj Esperanto-aranĝoj en 2012” (Aurora Bute).

En la dua parto, *Edukado per Esperanto*, oni prelegis Esperante pri diversaj fakoj: “Komputilprograma ilaro por elektronikaj lingvokursoj” (Radojica Petrović), “Sur la vojo de Sankta Jakobo” (Jozefo E. Nagy), “Instruado de apotekistoj kadre de la Universitato en la urbo Cluj inter 1872-1919” (Ștefan Budahazy), “La Biblioteko de Aleksandrio” (Mihaela Dolca), “La Danuba delto” (Adriana Dolca) k. a.

Mihai Trifoi gvidis la Konversacian Rondon pri manĝoj kaj pladoj, kaj oni argumentis por kaj kontraŭ la vegetarismo.

La sabatan debaton “Ĉu Esperanto estas facila lingvo?” gvidis Radojica Petrović. La “batalantoj” estis Stefan MacGill kaj Jozefo E. Nagy. En la fino, ambaŭ konsentis, ke ĝis iu grado Esperanto estas simpla, post tiu grado ĝi estas malfacila.

Dum la ekskursita tago ni vizitis la Kastelon Bánffy de Bonțida, la urbon Gherla (la armenan preĝejon) kaj la Monaĥejon Nicula. Dum la vizito de la armena preĝejo, alvenis la ambasadoro de Francio, kiu volis vidi gravan pentraĵon de Rubens. Li aŭskultis la Esperantan tradukon (de Jozefo E. Nagy) kaj interesiĝis pri la lingvo.

La simpozio estis bela plektiĝo de laboro kun ekskursoj kaj distro (interkona vespero, tombolo kaj dancado). Okazis ankaŭ estarkunveno de la landa asocio kaj ILEI-sekcio, dum triona estraro de ILEI (Stefan MacGill, Radojica Petrović kaj Enikő Sereghy) kunvenis aparte.

Aurora Bute

Unufraze

★ Jozef Reinart kaj Seán Ó Riain kiel reprezentantoj de EEU partoprenis konferencon “Multlingvismo en Eŭropo”, kiun la Eŭropa Komisiono organizis 16-28 sep en Limassol (Kipro) okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, lige al la 10a datreveno de la kunveno de Eŭropa Konsilio en Barcelono en 2002. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Naturfreunde Internationale (NFI), kies centralo situas en Vieno, komence de oktobro en sia jara konferenco unanime akceptis la Ean Naturamikaron kiel membron de NFI. (HeKo)

★ Giorgio Silfer prelegis 29 sep 2012 pri la temo “Verki en alia lingvo ol la gepatra: inter komunika projekto kaj kultura diasporo — la kazo de esperanto” en regiona PEN-konferenco en Budapeŝto. (HeKo)

★ Walter Veltroni — eksa urbestro de Romo, vicĉefministro de Italio, ministro pri kulturaj havaĵoj ktp. — en sia plej freŝa romano *Insulo de la Rozoj* metis Eon en la rolon de la oficiala lingvo en ĉi tiu insulo. (soc.culture.esperanto)

★ *Esperanta Finnlando* (= *Esperanto-lehti*) estas inter la gazetoj kiujn prezentis la gazeta asocio “Kultti ry” en la foiro Turun Kirjamesut 5–7 okt en Turku; ĉe la stando oni ankaŭ povis aĉeti E-lernolibron, finlingvan libron pri Zamenhof k *Kalevalan* en Eo. (EAF-agadas)

★ Laŭ peto de la turismoficejo de Bourges (meze de Francio) Armela LeQuint kaj Jak Le Puil tradukis en Eon informojn pri Bourges k ĝia regiono, kiujn oni povas elŝuti per iPhone kaj iPad. (*Esperanto*)

★ 1 sep la Transporta kompanio de Prago donis al la busa haltejo “Stavoservis” la nomon “Zamenhof” laŭ la apuda strato Zamenhof. (Esperanto.cz)

★ Ĉar dum la lastaj kvin monatoj demisiis la prezidanto (Arkadiusz Zychevicz), vicprezidanto, ĝenerala sekretario kaj la kasisto de la Pola E-Asocio, la asocio malaktiviĝis, pro manko de financa respondeco estas prokrastita la apero de *Pola Esperantisto*; por restarigi la funkciadon de la asocio estas planata membrosembleo, kiu provos kunmeti novan estraron. (Libera Folio)

★ 13 okt jarkunveno de la kooperativo Esperanto-Gården (Esperanto-Domo en Lesjöfors) 13 okt elektis estraron, kiu 14 okt elektis la funkciulojn kun Anna Ritamäki-Sjöstrand kiel la nova prezidanto. (EAF-agadas)



Laŭ EP-vicprezidanto, milionoj povas protesti, sed finfine ili ne plu protestos ĉar ili devos manĝi. (Foto de Pere prlpz, Vikipedio)

Vic-prezidanto de la Eŭropa Parlamento alvokas la armeon enmiksiĝi

de Dafydd ab Iago

Imagu tion: En la tempo, kiam la prezidantoj de la Eŭropa Komisiono (EU), Eŭropa Parlamento (EP) kaj Eŭropa Konsilio planas vojaĝi al Norvegio por ricevi la Nobel-premion por paco, vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento alvokas armeon forigi la demokratie elektitan registaron en Eŭropa regiono.

Estas nekredible, sed vere. Kompreneble, Hispanio ne estas Britio aŭ Belgio. Multaj hispanoj indignas kaj koleras, kiam ili pensas pri baskoj aŭ katalunoj kiuj volas sendependecon. “Ili ne rajtas” kaj “Estas kontraŭ la konstitucio” estas kelkaj el la plej oftaj reagoj. Kaj laste vicprezidanto de EP

La 9an de septembro en Prago forpasis

Jiří Vychodil (1940–2012)

Denaske nevidanta, li studis en konservatorio, laboris kiel muzika instruisto kaj informisto en asecura kompanio. Lernis Esperanton en 1954, kunfondis kaj prezidis la blindulan sektion de ĈEA, instruis Esperanton, redaktis la porblindulan revuon *Aŭroro*. Honora Membro de UEA (2004).

La 19an de septembro 2012 en Varsovio forpasis

Zofia Banet-Fornalowa (1929–2012)

Pollanda judino, ŝi sukcesis transvivi la Holokaŭston, iĝis instruistino de historio, lernis Esperanton en 1963 kaj baldaŭ mem instruis la lingvon. Verkis plurajn artikolojn kaj kelkajn librojn pri la Esperanta teatro kaj pri historio de Esperanto, inkluzive de *La familio Zamenhof* (2000), ekde 1983 gvidis la teatran grupon *Espero*, en kiu ĉefrolis ŝia edzo Jerzy Fornal.

La 13an de oktobro 2012 forpasis

Donald Broadribb (1933–2012)

Donald Broadribb naskiĝis en Usono, kaj en 1974 ekloĝis en Aŭstralio. Studis filozofion, teologion, lingvistikon kaj psikanalizon. Esperantisto ekde 1946, li diskoniĝis kiel redaktoro, tradukanto kaj teologo. Inter liaj tradukoj estas, interalie, *La respubliko de Platono*, *Alico en Mirlando* kaj *Trans la spegulo* de Lewis Carroll, pluraj verkoj de la Oz-serio de Lyman Frank Baum, *Mil naŭcent okdek kvar* de George Orwell, kaj multaj Mortmaraj rulaĵoj el Qumran.

Ni funebras kaj kondolencas.

La Ondo

Alejo Vidal Quadras alvokis la hispanian armeon forigi la nunan katalunan registaron kaj parlamenton.

Kvankam Vidal Quadras apartenas al nobela familio el Katalunio, li dum jardekoj kontraŭstaras ĉiun delegon de la registara povo al Katalunio kaj ĉiun oficialigon de la kataluna lingvo. Post manifestacio, dum kiu milionoj da homoj, laŭ la polico en Barcelono, pace protestis por la rajto voĉdoni pri sendependeco, Vidal Quadras alvokis la armeon enmiksiĝi.

Kiel ĉiu hispania registaro en Madrido ekde la restarigo de demokratio post la morto de la diktatoro Francisco Franco en novembro 1975, Vidal Quadras opinias, ke eŭskoj kaj katalunoj ne havas la rajton decidi pri sendependeco. Tamen la alvoko de la vicprezidanto de EP al la hispania armeo “restarigi” ordon en Katalunio, ŝokis multajn en Eŭropo.

Vidal Quadras alvokis forigi la registaron kaj parlamenton de Katalunio, se ĉi tiuj du demokratie elektitaj instancoj okazigos voĉdonadon pri sendependeco ĉi-monate. La armeo, laŭ Vidal Quadras, devos preni kontrolon de la kataluna polico, kaj la hispania registaro devos kontroli la katalunan registaron Generalitat. “Tio estas ĉio”, li diris. “La popolo ja povas iri al la stratoj. Sed ili ne povas protesti dum pli ol monato. Ili devas manĝi.”

Vidal Quadras, iama profesoro de fiziko, ne estas simpla membro de EP, li estas unu el ties vicprezidantoj. Tamen venis nur malforta respondo de la prezidanto de EP Martin Schulz. Li certigis, ke Vidal Quadras faris siajn deklarojn ne en sia rolo de vicprezidanto de la parlamento.

“Ili respegulas la personan opinion en nacia politika kunteksto”, — diris Schulz. Nekredible, sed alvoko al armeo forigi demokratie elektitan registaron kaj parlamenton ne estas, laŭ la prezidanto de EP, io por esti juĝita aŭ submetita al disciplina agado.

Almenaŭ Guy Verhofstadt, frakciestro de la Alianco de Liberaluloj kaj Demokratoj en EP, kondamnis la eldiraĵon de Vidal Quadras, kiel “relikvon el la pasinteco”, tute maloportunan en la hodiaŭa Eŭropo. Verhofstadt, kiu iam volis esti prezidanto de la Eŭropa Komisiono, aldonis: “Senzorgaj rimarkoj de ĉi tiu ulo subfosas ĉion, por kio demokratoj batalis dum la lastaj 60 jaroj”.

Restas malferma esenca kaj grava demando pri la estonteco de eŭropaj civitanoj el landoj kiel Flandrio, Katalunio kaj Skotlando post ebla pozitiva referendumo por sendependeco. Tiuj ŝtatoj, laŭ oficistoj en Bruselo, ne aŭtomate fariĝos EU-membroŝtatoj. Ekzemple, la prezidanto de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso respondis ke, se parto de EU-ŝtato fariĝis sendependa, devos esti trovita solvo por diskuti ĝin kadre de la internacia juro. Pli klare: la Eŭropa Komisiono emas pensi, ke la civitanoj de nova sendependa lando, kiel Katalunio aŭ Skotlando, ne estos EU-civitanoj sen aliĝo de tiuj novaj landoj al EU. Tio ankaŭ signifas, ke firmaoj el tiaj landoj ne povos vendi siajn varojn en EU je la samaj kondiĉoj kiel hodiaŭ.

Tio gravas precipe en la kazo de Katalunio. La hispania ministro pri eksterlandaj aferoj José Manuel García Margallo diris, ke Katalunio “eterne” restos ekster EU. La rankora García Margallo, ŝajne, volas punigi sendependan Katalunio kaj ties civitanojn.

Tute alia estas la publika debato en Britio. La ĉefministroj de Skotlando Alex Salmond kaj de Anglio/Britio David Cameron ridetis pasintmonate en la televid-programoj. Estas klare al ĉiuj, ke eĉ se Cameron kontraŭas sendependecon de Skotlando, li ne kontraŭas la universalan rajton de popolo mem decidi pri sia propra estonteco.

NR-11: 111 aliĝintoj el 11 landoj

Ĉi-jarfine okazos la 11a Novjara Renkontiĝo (NR) de EsperantoLand en Xanten, Germanio (inter Düsseldorf kaj Nijmegen). Estos unu semajno de bela internacia kunestado, de la 27a de decembro 2012 ĝis la 3a de januaro 2013.

Intertempe aliĝis jam 111 homoj el 11 landoj al tiu ĉi 11a NR. Bela internacia miksaĵo — 36 el Germanio, 27 el Belgio, 15 el Francio, 9 el Svislando, 8 el Nederlando, 5 el Hispanio, 5 el Luksemburgio... Aliĝis jam 40 infanoj kaj junuloj ĝis 19 jaroj, por kies deziroj ekzistas la programeroj de la Novjara Internacia Semajno (NIS).

Ĉi-foje estos tri koncertoj, de Tone, JoMo kaj de Patrik (de la grupo *Dolĉamar*). Estas krome jam listo de dudeko da kursoj kaj prelegoj. Aldoniĝos al la programo certe deko da specialaj ofertoj por infanoj kaj junuloj. Ni faros ekskurson al la arkeologia parko de Xanten, kiu memorigas ĉefe pri la romia historio de la urbo, kaj certe iom plu esploros la regionon.

Ĉion ĉi preparas por vi la sperta teamo de Christoph Frank, Betti Maul-Propadoviĉ kaj Nicky Janssen — kun multaj tre afablaj helpantoj. Grandan dankon al ĉiuj!

Kompreneble estos lingvaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj konversacia rondo — por iom subteni la lingvo-lernadon en EsperantoLand.

<http://www.esperantoland.org/nr/#nr>

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

Schleyer kaj Volapük-vino



La ĉi-jara 100a dat-reveno de la morto de Prelato Johann Martin Schleyer (1831–1912), la aŭtoro de Volapük, rezultigis atentindan eĥon en german-lingvaj ĵurnaloj kaj revuoj. La plej impona manifestacio estis la ekspozicio en la Bavara Nacia Biblioteko en Munkeno (vd. *La Ondo de Esperanto*, 2012, №6, p. 8; №8–9, p. 9).

En aŭtuno sekvis du pliaj aranĝoj: en la naskiĝ-loko de Schleyer, Oberlauda, la tiea Hejm-landa Asocio aranĝis kunvenon kun prelego pri la vivo de la plej fama filo de la vilaĝo kaj anonciĝis la fakto, ke loka vin-bieno aplikanta bio-dinamikan agrikulturon lanĉis Volapük vinon “Edition J. M. Schleyer” el la vito Müller-Thurgau. El ĉiu vendita botelo unu eŭro fluos al la kreo de nova Volapük-placo en Oberlauda.

La 4an de oktobro la subskribinto faris fest-prelegon en Martin-Schleyer-Gimnazio. Koruso konsistanta el instruistoj kaj gepatroj prezentis la Volapük-himnon. Unua-foje en la fina gimnazia klaso la estontaj abiturientoj povas frekventi kurson pri Schleyer kaj Volapük, en kiu ili devas prezenti referaĵon.

Du libroj pritemaj estas en preparo por baldaŭa eldono: kompleta bibliografio de la verkaro de Schleyer (kun bibliotekaj trov-lokoj) kaj kolekto kun tekstoj en ligo kun la estiĝo de Volapük.

La eldiro de Zamenhof, ke Schleyer estas la vera patro de la internaci-lingva ideo trovis denove brilan konfirmon.

Reinhard Hauptenthal


lernu! montras fragmenton de nova kurso

En la komenco de la 2013a jaro lernu.net relanĉiĝos kun komplete nova paĝaro — interalie, kun nova ampleksa kurso, nova biblioteko, kaj novaj forumoj. La nova kurso por komencantoj kreiĝas laŭ nivelo A1/A2 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) por instruado de lingvoj. La kurso baziĝos je rakonto skribita aparte por la kurso de eminenta verkisto Anna Lowenstein.



Anna Lowenstein kunlaboras kun edukisto Birke Dockhorn por skribi interesan kaj atentokaptan rakonton, kiu enkondukos gramatikajn elementojn iom post iom, kaj fariĝas lingve pli malfacila en ĉiu ĉapitro. Per la rakonto, lernantoj lernos kiel trakti diversajn kutimajn vivajn bezonojn en Esperanto — kaj ankaŭ kelkajn bezonojn kiuj estas pli specifaj por Esperantujo. La rakonton riĉigos ekzercoj, skribitaj de edukisto Birke Dockhorn, kaj ilustraĵoj kiuj estas kreataj aparte por la kurso.

Erin Piatieski



Elĉerpaĵo de la nova kurso

(verkis Anna Lowenstein)

«La jaro estas 1982 (mil naŭcent okdek du).

En la ĉambro estas stranga bruoj. Stranga bruoj kaj stranga lumoj. Kio okazas?

Aperas en la ĉambro granda ŝranko. Kio okazas? Kio estas tio?

Filipo rigardas. Li krias. Li timas.

Viro venas el la ŝranko. “Saluton, Filipino,” li diras.

Filipo timas. “Kiu vi estas?”

La viro diras, “Mi estas Filipino Nakamura.”

Filipo krias, “Sed tio ne eblas. Mi estas Filipino Nakamura!”

La viro diras, “Jes, vi estas Filipino Nakamura. Sed ankaŭ mi estas Filipino Nakamura. Ni estas Filipino Nakamura. Mi estas vi. Mi venas el la jaro 2012 (du mil dek du).”

Filipo svenas»

Kvakerismo: sendogma religio kun radikoj en angla kristanismo, bazita sur la kredo ke ĉiu homo povas sperti rektan inspiron el Dia fonto. Tion ni elserĉas dum silentaj kunvenoj. Konatiĝu kun kvakera pensado historia kaj nuntempa per engrupa reta interskribado pri kvakeraj tekstoj. Ĉiom en Esperanto.

Kvakera E-Societo: <http://www.noos.ch/kes/>

Informoj/aliĝo:  douglas.esperanto@gmail.com

La Granda Malordo

Eseo de Sergio Pokrovskij

Antaŭ 400 jaroj, la 25an de oktobro de la jaro 7121a (gregorie 1612-11-04) la moskva garnizono de caro Vladislavo la 1a kapitulacis kaj forlasis Kremlon; per tiu evento la rusaj historiistoj (aŭ politikistoj) datas la finon de la Granda Malordo (Великая Смута) en Rusio.

Formale kelkaj epizodoj kaj roluloj de la Granda Malordo similas tiujn de la Milito de la Rozoj en Anglio, okazinta 150 jarojn pli frue; tamen la skalo de la rusia katastrofo estis nekompareble pli vasta: pli ol supraĵa dinastia kverelo en la reganta klaso, ĝi ĝisfunde implikis la tutan socion kaj estis vera *civitana milito*, la unua en la historio de Rusio.

Absolute maleblas resumi la multajn eventojn de tiu tumulta jardeko en gazeta artikolo; anstataŭe mi skizos kelkajn portretojn kaj precipe uzos la okazon esperantigi kelkajn terminojn kaj nomojn. Por pli bone internaciigi la prezenton de la rusiaj realaĵoj mi profitis la priskribon de la koncernaj eventoj fare de ties eksterlandaj partoprenantoj: la franca kapitano Marĵereto (*Jacques Margeret*, franca aventurulo kaj kapitano de la gvardio de Falsdemetrio)¹ kaj la pola hetmano Ĵulkefski (*Stanisław Żółkiewski*)².

La disfalo de Sovetio reaktualigis la temon pri la Granda Malordo, kaj diversaj vortoj kaj konceptoj tiurilataj reaparis en la rusia politiko.

ANTAŬHISTORIO

Johano la Timinda (1530 / 1584)

La regado de ĉi tiu caro formale estas ekster la priskribata periodo, tamen maleblas paroli pri la Granda Malordo sen menciigi tiun grandiozan figuron, unu el la fokusoj de la rusa historio.

Unu grava trajto de lia regado estis lukto kontraŭ la potenco de la aristokrataro (la bojaroj), al kiu li kontraŭmetis la klason de *statservistoj* (служилые люди, la burokratoj kaj la militistoj), el kiuj poste formiĝis la rusia nobelaro (komencante verki ĉi tiun artikolon mi hezitis uzi la terminon *nobeloj*, kiu ŝajnis al mi anakronisma; tamen mi konstatas, ke la samtempano Marĵereto uzas



Johano la Timinda

ĝuste la vorton *noblesse* por priskribi la koncernan ordumon). La provoj de la bojaroj reakiri la perditajn poziciojn estis grava malstabiliga faktoro de la Granda Malordo.

Alia gravaĵo estis manko de taŭga sukcedonto. El la 5 filoj de Johano la Timinda post lia morto restis du:

- la 27-jara Teodoro, mense debila;
- la 17-monata bebo Demetrio.

Simile al sia pli aĝa samtempano Henriko la 8a de Anglio, caro Johano estis homo morala, kaj edziĝadis al siaj amatinoj. Tamen malsimile ol Henriko, kiel ortodoksulo li ne bezonis senkapigi la antaŭajn edzinojn, ja sufiĉis ilin monaĥinigi. Tamen la ortodoksa eklezio ne permesas al siaj anoj edziĝi pli ol tri fojojn; post la kvara edziĝo la caro dum kelka tempo ne povis komunii kiel kateĥumeno. Liaj postaj 4 edziĝoj estis eklezie nevalidaj, kaj s-ta Demetrio, la filo de la lasta (7a) edzino, formale estis bastardo (Henriko edziĝis nur 6 fojojn).

Caro Teodoro (1557 / 1584 / 1598)

La rajtojn de Teodoro je trono konfirmis la *Tutlanda Asembleo*. La landon regis speciala komitato da regantoj, kiu baldaŭ reduktiĝis al la sola “protektanto” Boriso Godunov (Борисъ Годуновъ).

La debilmensa caro Teodoro ricevis en la publika opinio de siaj samtemp-

anoj (interalie sub la plumo de patriarko Ijubo) la ŝatatan en Rusio karakteron de “malsaĝulo pro Kristo” (1Kor 4:10), unu el tiuj “malriĉaj en spirito” (Mat 5:3) al kiuj la Regno Ĉiela pli konvenas ol regno tera. Tiu tipo de sankteco estas malmulte konata okcidente — kvankam io simila okazis pri simile debila Henriko la 6a de Anglio, ĉe kiu komenciĝis la Rozmilito, kaj per kiu finiĝis la Lankastra linio de la Plantagenetoj.

Pluan evoluon de tiu bildo prezentas la tragedio “Caro Teodoro” fare de A. K. Tolstoj; la caro aperas en ĝi tre simila al la ĉefpersono de “La idioto” fare de Dostojevskij — egala enkorpiĝo de la kristana idealo, egale dispremata de la reala mondo.

Carido Demetrio (1582 / 1591)

Je la sekva nokto post la morto de Johano la Timinda okazis ribelo en Moskvo favore al la malpli aĝa carido. La ribelo plene malsukcesis, kaj regantoj forsendis Demetrimon kaj lian patrinon en lian posedaĵon, la Ugliĉan princaĵon.

La carido mortis je 1591-05-25, aĝante 8 jarojn. Objektive tiu morto malfermis al la reganto Boriso Godunov’ la vojon sur la tronon. Tial multaj historiistoj (ekde la samtempoj de Boriso) lin kulpigis pri la murdo – simile al la murdo en la jaro 1483a de la knabo Eduardo la 5a de Anglio kaj lia frato fare de la Protektanto de la regno la onta reĝo Rikardo la 3a (ankoraŭ unu similaĵo: la anglaj reĝidoj estis bastardoj). Ankaŭ Puŝkino aliĝas al tiu versio en sia “Boriso Godunov” — simple ĉar tio ebligis al li verki ŝekspirecan tragedion.

Tamen historie tio ne ŝajnas probable. Teodoro regis ankoraŭ 7 jarojn, kaj principe povus havi filon (unu jaron pli malfrue, je 1592-05-19, al li naskiĝis filino Teodozia). Morale Boriso povus murdigi, sed se li planus murdon, li ĝin pli lerte aranĝus.

Boriso formis komisionon kiel eble plej aŭtoritatan, kiun estris lia plej grava oponento Bazilo Ŝujskij (la onta caro). La komisiono konkludis, ke Demetrio sin morte vundis ludante per tranĉilo dum epilepsia atako.

La malfeliĉa princo de Ugliĉo ŝajnis senmorta: trifoje pereinta, li fojon post fojo releviĝos, multigante la suferojn de sia popolo.

Caro Boriso

Ekde la jaro 1585a, do dum 13 el la 14 jaroj da carado de Teodoro, Rusion regis lia bofrato Boriso Godunov, ricevinta senprecedencan titolon *reganto* (правитель), kiun Marĵereto francigas per *protektanto de la regno* (*protecteur du país* — p. 17, simile al la posta titolo de Kromvelo).

Li regis prudente kaj lerte, kaj lasis la landon ripozi post la tumultoj kaj teruroj de la reĝimo de Johano la Timinda. La sukcesa milito kontraŭ Svedio ne rompis tiun ĝeneralan impreson (rezulte de tiu milito Rusio facile reakiris la eliron en la Baltan maron, perdotan dum la Granda Malordo; rezulto pri kiu Petro la Granda pene kaj sange militos 21 jarojn).

Tradicie la eklezion de la Moskva Regno estris metropolito, subordigita al la Konstantinopola patriarko. En la jaro 1589a Boriso sukcesis promocii metropoliton Ijobon je la rango patriarka kaj tiel sendependigi la nacian eklezion; Ijobo ĉiam estis kaj restis fidela amiko de la Godunovoj.

Je 1598-01-17 mortis caro Teodoro, kaj kun li estingiĝis la dinastio de Johano la Monsako (Иван Калита), reginta Moskvon dum tri jarcentoj (samkiel la francaj Valezianoj, estingiĝintaj 9 jarojn pli frue). Laŭ la dinastiaj konsideroj la laŭleĝa sukcedonto estus rurikido princo Bazilo Ŝujskij (pri kiu ni parolos poste); sed tiuj konsideroj malmulte gravis en la tiama publika opinio de Moskvo. Pli gravis rilatoj al la mortinta caro, kaj tiajn havis lia bofrato Boriso Godunov, kaj liaj kuzoj Romanovoj.

Por sin surtroni Boriso tre zorge plenumis ĉiujn konvenaĵojn. Dum kelkaj monatoj li lasis la bojarojn sin kvereli kaj montri sian malkapablon regi; poste li lasis la Tutlandan asembleon elekti lin caro estkiel elproviton reganton kaj boparencon de Teodoro.

Tiuj proceduroj estis modelo por la postaj elektoj; interalie, la manifesto pri elekto de Miĥaelo Romanov estas evidenta (kaj mallerta) paŭsaĵo de la manifesto Borisa.

Sur la trono li provis daŭrigi la saman politikon, kaj la du unuaj jaroj de lia carado estis same prosperaj. Sed la jaro 1601a alportis elementan katastrofon.



Boriso Godunov

Dume en Peruo

Tiuepoke sur la tero estis “la malgranda glaciepoko”, proksimume de la jaro 1550a ĝis la 1850a. La someroj estis pli mallongaj, la vintroj pli frostaj; sed la vera klimata katastrofo okazis en Rusio en la jaroj 1601a–1603a. Supozeble ĝin kaŭzis erupcio de la perua vulkano Vajnaputino (hispane *Huaynaputina*, de la keĉuaj *wajna* = juna kaj *putina* = vulkano) ekde 1600-02-12 — la plej forta erupcio en la Suda Ameriko el ĉiuj historie observitaj. Por la tuta Norda duonglobo la jaro 1601a estis la plej malvarma el la ĉirkaŭaj 6 jarcentoj (pri la duonglobo suda datumoj mankas).

En la centra Rusio la rikolton de la jaro 1601a forlavis deksemajna pluvego, kiun jam je la Endormiĝo sekvis neĝo kaj frostoj. Ankaŭ la du sekvaj jaroj estis senrikoltaj. Okazis granda malsato en la lando.

Boriso entreprenis energiajn aranĝojn socipolitikajn. Vidvinoj kaj malriĉuloj ricevis monan subvencion. La ŝtataj grenejoj vendis la panon duonpreze. La ŝtato aranĝis transporton de greno el la rikoltohavaj regionoj (ekz-e tiu de Kursko) en Moskvon.

Tiaj mezuroj povus helpi ĉe unujara misrikolto, sed ĉi tiu katastrofo daŭris 3 jarojn. Laŭ la opinio de la samtempoj, dum la malsatego Rusio perdis trionon da sia loĝantaro.

La rikolto de la jaro 1604a finis la malsaton, tamen tio ne povis forviŝi la signon: la katastrofo kiel eble plej klare indikis, ke Dio malakceptas la novan dinastion. En Pollando aperis nekonato kiu sin prezentis carido Demetrio, mirinde saviĝinta de murda atenco. Jam

je 1604-10-03 komenciĝis *la unua Demetriado* (1604–1606).

Matene de la tago 1605-04-03 Boriso fartis bone; sed post la tagmanĝo li mortis en kelkaj horoj. Marĵereto sendetale diras, ke de apopleksio; la rusaj fontoj priskribas aliajn simptomojn, pli similajn al veneniĝo. Lia 16-jara filo Teodoro iĝis caro. Sed la subita morto de Boriso plifirmigis la opinion, ke Dio koleras kontraŭ la Godunovoj, kaj la cara armeo, militanta ĉe Kromo (Кромь) transiris al Falsdemetrio. La moskvanoj detronigis Teodoron, kaj je 1605-05-31 la bojaroj mortigis lin kaj lian patrinon.

LA PREMISOJ DE LA KRIZO

Konfliktoj en la reganta elito

Johano la Timinda promociis la nobelaron en la reganta elito, kaj deŝovis la aristokrataron. Post la morto de Teodoro Boriso (kiu estis “nova bojarro”) alianciĝis kun alia malaristokrata klano, la Romanovoj — kaj kune ili retenis la akiritajn poziciojn de la nobelaro (nu, surtroniĝinte Boriso monaĥigis la ĉefon de la Romanovoj, kiu iĝis lia malamiko kaj poste, patriarko Filareto).

La bojaroj solidare kontraŭstaris la nobelojn — tamen inter si ili senĉese rivalis kaj kverelis (precipe post kiam malfortiĝis ilia komuna malamiko la nova nobelaro). Flegante tiajn kverelojn, Johano promociis inter la bojara ordumo la litvodevenan genton da gediminidoj kontraŭ la tradicia gento da rurikidoj (al kiu apartenis la reganta dinastio).

La gediminidoj konservis la rilatojn kun siaj pola-litvaj parencoj, kaj kiam komenciĝis la problemoj de la Borisa regado konsideris la eblon anstataŭigi lin per la pola reĝido Vladislavo (supozante ke la knabo pli facile ol adolto povus edukiĝi en la moroj kaj religio de la Moskva Regno); sekrete ili faris koncernajn proponojn al la pola reĝo Sigismundo, la patro de Vladislavo — sed malsukcesis.

La kozakoj

Dum la granda malsato multaj homoj migris en la malpli katastrofajn regionojn, interalie en Sjeverion kaj najbarajn teritoriojn kozakajn.

Tiutempe la kozakoj estis speco de stepaj vikingoj, homoj fuĝintaj el la tradicia socio kaj vivantaj en “nenies lando”. La plej fekundaj teroj de Ukrainio

estis sendefendaj kontraŭ la tataraj invadoj el la sudo. La kozakoj okupis tiun bufran zonan; ofte ili rezistadis la invadojn (kaj ricevadis helpon de la registaro por tio); sed iam ili mem aranĝis rabistajn invadojn kontraŭ siaj najbaroj — Krimeo, Pollando, Persio, eventuale ankaŭ Rusio.

Samkiel okazis pri vikingoj, la postaj epokoj prezentis romantikan bildon de la liberamaj kozakoj; en Ukrainio la kozaka estraro formis lokan nobelaron anstataŭintan la tute poliĝintan nobelaron de la iama Kieva Regno; en la sudrusiaj regionoj la kozakoj el socia grupo formis specifan etnon.

Tamen en la koncerna epoko la kozakaj bandoj estis kerno de la ribeloj kaj multe profitis el la landa malordo.

La polaj etnabeloj

La feŭdismaj socioj produktadis tro multe da nobelidoj, malriĉaj kavaliroj grandambiciaj kaj senrimedaj. En la 11a jc papo Urbano la 2a sukcesis direkti tiajn aventurulojn en la Krucmilitojn; en la koncerna periodo la polaj aventuruloj trovis similan arenon en la *Demetriadoj*. La etnabeloj kaj la kozakoj, sociaj antipoduloj, rolis tute simile en la Granda Malordo.

LA GRANDA MALORDO

La unua Falsdemetrio (1605–1606)

Sendube, la unua Falsdemetrio estas la plej romantika kaj mistera figuro de tiu epoko. La registaro de Boriso kaj poste de Bazilo la 4a deklaris ke li estis eksmonaĥo Gregorio Otrepjev; tion kredas pliparto da modernaj historiistoj; mi tamen opinias tion same malprobabla, kiel la version ke li estis la vera Demetrio.

La rusan li parolis kiel ruso, sed ne kiel moskvano; la ikonojn li honoris en maniero ŝoka por la moskvanoj (ĉu tio eblus por eksmonaĥo Gregorio?!³); li facile komunikis en la pola, iomete sciopovis Latinon (kvankam skribis “inperator”), lerte pafis, rajdis, dancis kaj skermis.

Nuncio Rangoni (*Claudio Rangoni*) raportis (1604):

«Demetrio aĝas proksimume 24 jarojn, li estas senbarba, havas viglan menson, ŝatas filologion, estas tre elokventa, senriproĉe deca, tre modesta kaj sobra». (La carido Demetrio tiam havus 22



Falsdemetrio I
(portreto de Luko Kiliano)

jarojn; Marĵereto vidis Falsdemetron du jarojn pli malfrue, kaj atribuis al li 25 jarojn.)

Ekzistas pluraj portretoj de Falsdemetrio, tamen malmulte fidindaj. Historiisto N. Kostomarov ekzamenante la portreton de Falsdemetrio gravuritan de Luko Kiliano el Aŭgsburgo (*Lucas Kilianus, Augustae Vind. An. MDCVI*) komentis, ke “neniu volus pruntedoni monon al nekonata ulo kun tia fia fizionomio aŭ fidi lin en iom grava afero”. — Sed Kiliano neniam vidis sian modelon! Kaj aliflanke, ni scias ke Falsdemetrio fascinis la homojn kun kiuj li komunikis, de la kozakoj kaj moskvaj pleboj ĝis la pola reĝo Sigismundo la 3a kaj sia fianĉino Marina, filino de magnato la vojevodo Sandomera (*Sandomierz*).

Laŭ la pli fidindaj priskriboj Falsdemetrio estis malalta (malpli ol mez-kreska), brunhaŭta (*brun de complexion¹*), tre larĝaŭltra, dikkola, sen talio, tre forta.

Falsdemetrio facile kaj multe promesis al la papo kaj al Sigismundo; sciigite pri lia surtroniĝo, la reĝo kaj la papo tuj sendis gratulleterojn postulante la promesitaĵojn. Tamen Falsdemetrio lerte evitis la temon, uzante la tradician rimedon de la moskva diplomatio. Johano la Timinda sin titolis *caro*, kio evidente signifis *cezaro, imperiestro*. La poloj rifuzis agnoski tion, kaj plu titolis la moskvajn regnestrojn *ĉefprinco*. Falsdemetrio postulis eĉ pli arogantan titolon *imperator invictus* (nevenkebla imperiestro).

Sigismundo sendis leteron (datitan per 1606-08-23) kun la kutima “ĉefprinco”; Demetrio rifuzis ĝin akcepti. Ŝokite

de la aroganteco de la *nevenkebla imperiestro*, Sigismundo falis en la kaptilon, kaj postan leteron insulte adresis al *nobela viro*. En tia stato de la rilatoj la promesitaj Smolensko kaj Sjeverio iel forglitis en malproksiman vicon.

La papo estis pli fleksebla, kaj de li Demetrio ja ricevis la adreson *Serenissimo et invictissimo Monarchiae Demetrio Joannis, Caesari ac Magno Duci totius Russiae, atque universorum Tartariae regnorum aliorumque plurimorum dominiorum, Monarchiae Moscoviticae subjectorum, Domino et Regi*; sed ankaŭ tio malmulte avancigis lian aferon.

Fakte, de post sia eniro en Moskvon Falsdemetrio neniom bezonis la polan helpon: li estis populara kaj lia potenco estis senkontesta. Sed li ne rompis kun la poloj kaj kun la papo, ĉar li havis pli grandajn ambiciojn: li volis esti pli ol caro de Moskvio.

Demetrio ŝatis ne nur moskvanojn, sed ankaŭ poloj, kaj iuj el ili faris projekton pri rusa-pola unio en la persono de Demetrio, anstataŭ la nepopulara Sigismundo la 3a — interalie dum la ribelo de Zebjodofski (*rokosz Zebrzydowski*, 1606–1607). Por la vojaĝo el Kremlo al Vavelo Falsdemetrio ja estis pli bone ekipita ol juse por la vojaĝo el Sandomero al Kremlo.

Jam firme establiĝinte en Moskvon, antaŭ sia kronado, li humile demandis la nuncion, ĉu escepte li komuniu laŭ la ortodoksa rito (la ortodoksa kronado entenas komuniojn kiel sian parton). Kaj antaŭ ol venis la papa malpermeso, li anticipis komuniis katolike, kaj poste dum la kronado ankaŭ ortodokse. 12 jarojn pli frue Henriko la 4a juĝis, ke Parizo valoras (unu) meson; Falsdemetrio simile juĝis ke Moskvon valoras du komuniojn [:)] Kaj Demetrio esprimis sian kontenton ke lia kronado okazas je la nomfesto de Ignacio Lojolo.

Lia toleremo religia limis skeptikismon: la konfidenculoj kaj sekretarioj de la ortodoksa caro, sekrete konvertita en katolikismon, estis du protestantoj.

Aliflanke, li efektive amis vojevodidinon Marina, kaj la promesojn al ŝia familio li ja iel tenis (kvankam ignori ilin estus pli facile ol la promesojn al la reĝo kaj al la papo).

Alia lia projekto estis granda kontraŭturka alianco de la kristanaj monarkoj, en kiu li rezervis al si eminentan rolon. Prudenta homo juĝos tiujn projektojn ĥimeraj — sed prudenta homo ankaŭ la ĵusan surtroniĝon de Falsdeme-

trio juĝus afero nerealigebla. (Fakte li komencis prepari militiron direkte al Azovo, kolekti trupojn kaj artilerion.)

Plurriate Falsdemetrio similas Ĥlestakovon el *Revizoro* de Gogolo, kaj nemalofte la bojaroj lin atentigis: “Granda caro, vi mensogas”. Antaŭ la veno de sia fianĉino en Moskvon li petis la bojarojn sin deteni de tiaj rimarkigoj; demandite, en kiu alia formo ili sin esprimu, li konfuzite promesis ne plu mensogi (kaj kompreneble ne sukcesis).

Atentinde, la diversaj ribeloj kaj tumultoj, unu el kiuj portis Falsdemetron en Kremlon, sub lia regado iel kvietigis.

Dum Falsdemetrio transprenis la potencon, la angla ambasadoro Tomaso Smit (*Thomas Smith*) estis forveturonta hejmen, malkontenta pri koncedoj kiujn faris Boriso (duonaj doganoj por la angloj) — kvankam moskvaj politikistoj kaj alilandaj komercistoj opiniis ilin troaj. Demetrio lin revenigis kaj promesis sendi ambasadon en Londonon kaj doni ĉarton kiu superos la esperojn de la angloj. Efektive, li subskribis la ĉarton liberigantan la anglojn je ĉiaj doganoj; tio ŝajnis al ili la sopirata monopolo! Tamen Demetrio vidis la aferon alie: li simple neniigis ĉiujn doganojn, ankaŭ por alilandaj negocistoj. La angloj do ricevis nenian avantaĝon.

Ankaŭ interne li faris plej liberalajn reformojn, neniigante ĉiajn profesiajn malpermesojn. Rezulte dum lia mallonga regado Moskvo ĝuis grandan malaltigon de la prezoj. Onidire, sub Demetrio Ruslando estis la plej liberala merkato de la mondo.

Malfacilas diri, kiom longe li povus teni tian politikon, precipe konsidere liajn planojn konduki grandajn militojn kaj lian eksterordinaran malŝparemon:

En januaro de la jaro 1606a, post 6 monatoj da regado de Falsdemetrio, lia sekretario J. Buĉinski (*Jan Buczyński*) kalkulis la elspezojn de la juna caro je 7 kaj duono da milionoj da zlotoj — t. e. 2½ da milionoj da rubloj, do ne malpli ol kvaroblon de la jara ŝtatbuĝeto!

Ĝis sia morto Falsdemetrio restis populara en la popolo, kiu pardonis al li liajn okcidentajn vestojn kaj manierojn, eĉ malgraŭ la malamo kontraŭ lia pola sekvantaro. Karakterize, por penetri Kremlon la anoj de la bojara konspiro jetis la krimon ke la poloj mortigas la bojarojn (kio malmulte impresis la popolon) *kaj volas murdi la caron*.

Finiĝis la 11-monata gaja karnavalo.

La resto de la Granda Malordo estas unutone nigraj jaroj da mizeroj kaj katastrofoj.

Bazilo la 4a (1547 aŭ 1552 / 1606–1610 / 1612)

La bojaran konspiron aranĝis Bazilo Ŝujskij (Васи́лій Ио́аннович Шу́йский), kaj li iĝis la sekva caro. Mi malŝatas pentri historian personon per unu sola farbo, sed mi vere trovas nenian bonan trajton en la lasta rurikido sur la rusia trono. La intereso de ĉi tiu figuro eble estas ke ĝi ideale prezentas la banalan kaj platan tipon de fia aĉulo.

Ne tiom inteligenta kiom perfida kaj ruza, li eble estus nemalbona reganto por tempo paca, sed dum la Malordo li superruzis ĉiujn kaj ankaŭ sin mem. Superstiĉa, li ne hezitis mensoge ĵuri per la nomo de Dio kaj misuzi sanktaĵojn por siaj bezonoj politikaj. Vanta kaj bagatelema, avara, enviema kaj suspektema; ĉiam mensogema kaj ofte miskalkulanta, sed pardonita de Boriso kaj Falsdemetrio; kiam liaj mallertaj konspiroj tamen sukcesis, tio okazis pro malatento de liaj viktimoj.

Lia eminenta deveno ebligis al li suriri la tronon, sed tie li montris sin la plej mizera el la moskvaj regnestroj; eĉ la debilmensa Teodoro aspektis pli dece, danke al la prizorgo de Boriso.

Ankaŭ lia fizika aspekto estis mizera: aĝante ne malpli ol 55 jarojn, li estis maldika, malalta, ĝibeta maljunulo kun sulka vizaĝo, malsanaj okuloj, longa nazo, granda buŝo, maldensaj hararo kaj barbo.

La kadavron de Falsdemetrio la ribeluloj kripligis kaj, metinte sur lian vizaĝon bufonan maskon, prezentis al la publika moko. Rezulte homoj deklaris, ke ili ne rekonas en la kadavro Demetron, kaj formiĝis la onidiro, ke li ankoraufoje saviĝis. La manifesto de Bazilo, evidente mensoga pri la cirkonstancoj, ankoraŭ pli pridubigis la ĉeffakton.

Por rezisti la ĉarmon de la senmorta Demetrio, por lin definitive mortigi, Bazilo decidis lin sanktuligi (1606).

Sub Boriso li estris komisionon, kiu konkludis, ke Demetrio sin mortigis en epilepsia atako. Ĉe la veno de Falsdemetrio Bazilo prezentis novan version, kiu negis la fakton mem de la morto de la carido. Nun, refutante siajn du antaŭajn versiojn, li prezentis version trian: ne estis memmortigo (kio malebligis sanktuligon), ne estis epilepsio (kio en la opinio mezepoka indikis demon-

posedon), sed estis perfida murdo. Senditoj de Bazilo malfermis la tombon de la carido, kaj trovis tie tute freŝan, senputran kaj bonodoran korpon; en la mano la kadavro tenis nuksojn, kio okulfrape refutis la version pri ludo per tranĉilo.

La kadavron oni transportis en Moskvon kaj entombigis en la cara kirkego, apud la aliaj tomboj de regnestroj moskvaj. Tuj komenciĝis serio da miraklaj kuracoj ĉe la freŝa tombo, klare pruvantaj la sanktecon de la carido (13 kuracoj en la unua tago); sed poste, kiam malsanulo alportita al la tombo mortis surloke, la aliron al la tombo oni malpermesis. Ĉiel ajn, Demetrio de Ugliĉo restas sanktulo de la Rusa ortodoksa eklezio kaj la ĉiela patrono de Ugliĉo.

Falsdemetrio promesis multe kaj al ĉiuj; nun ĉiuj vidis en la bojara konspiro finon de siaj esperoj. Eĉ inter si la bojaroj rivalis kaj kverelis. La tuta lando ribeliĝis kontraŭ la bojara caro, kaj dum la kvar jaroj da sia regado Bazilo regis malmulte pli ol sian ĉefurbon.

La dua Falsdemetrio (1607 / 1610)



En la Moskva Regno ribelo sekvis ribelon, ĉiu atendis venon de mirakle saviĝinta Demetrio — sed Demetrio forestis. Intertempe en Pollando la ribelo de Zebjidoŝki malvenkis, kaj la polaj etnabeloj serĉis novan okupon. Ili do trovis duan Falsdemetron por *la dua Demetriado* (1607–1608).

Laŭ unu el la probablaj versioj la dua Falsdemetrio estis pastrido kiu servis kiel hejma instruisto en Mohilov; foje kelkaj polaj aventuroj vidis lin surstrate, kaj unu el ili rimarkigis, ke tiu

malalta mizerulo povas roli kiel Falsdemetrio. S-ro Mehovicki (*pan Mikolaj Miechowicki*) kaptis la ideon kaj tuj ĝin realigis, malgraŭ la rezisto de la viktimo. Ekde la komenco la dua Falsdemetrio estis marioneto de la polaj aventuruloj.

En julio de la jaro 1608a la trupo de la dua Falsdemetrio sin lokis en la apudmoskva urbeto Tuŝino (Тушино), kiu iĝis alternativa ĉefurbo; sekve de tio la kontraŭuloj nomis la duan Falsdemetrian la *Tuŝina Latrono* (Тушинский вор), kaj la moknomo alĝluiĝis al li en la historio.

Tiutempe Bazilo permesis al la poloj venintaj kun Falsdemetrio kaj lia edzino Marina iri hejmen. Marina kaj ŝia patro zorgis aranĝi sian vojaĝon tiel, ke pola taĉmento de la Latrono kaptu ilin. La kaptintoj lojale avertis Marinan, ke la Latrono estas ne ŝia edzo sed ia kanajlo; sed ŝi insistis pri rendevuo. Lin ekvidinte ŝi ekkriis: “Prefere morti!” — tamen baldaŭ sin superregis, sekrete al li edziniĝis kaj naskis filon.

Nemalmulte da rusaj moŝtuloj, kaptite aŭ libervole, aperas ĉe la kortego en Tuŝino; inter ili Teodoro Romanov, monaĥigita de Godunov sub la nomo Filareto, akceptis de la Latrono la oficon de patriarko (paralele kun la moskva patriarko Hermogeno).

Sigismundo la 3a Vaza

La Demetriadoj estis privata entrepreno de individuaj polaj nobeloj. Tamen en septembro de la jaro 1609a la pola reĝo Sigismundo komencas sian militon.

Tiu pola reĝo estis ankaŭ la hereda reĝo de Svedio; tamen sekve de ribelo la svedan kronon transprenis lia onklo (Karolo la 9a), kaj la penado ĝin reakiri iĝis la ĉefa zorgo de Sigismundo. Rusion li rigardis kiel rimedon en tiu lukto.

Rezultis duobla pola invado: la privata pola-kozaka Demetriado en Tuŝino, kaj la reĝa sieĝo de Smolensko. La reĝo postulis, ke la tuŝinanoj aliĝu al lia milito; tiuj postulis kompenson por salajro promesita por partopreno en la Demetriado, kaj la unuiĝo fiaskis.

La pozicio de la Latrono iĝis neeltenebla, kaj je 1610-01-05 li fuĝis el Tuŝino en Kalugon (Калуга, alia urbo apudmoskva); la kozakoj lin sekvis, la bojaroj restis kun la poloj, kaj estrate de la “patriarko” Filareto (Romanov) ili revenis al la ideo inviti la reĝidon Vladi-

slavon cari en Moskvo. Ĉe Smolensko Sigismundo akceptis iliajn sufiĉe libera-lajn kondiĉojn por sia filo Vladislavo.

Hetmano Ĵulkefski (Żółkiewski)

Bazilo provis helpi Smolenskon, tamen la de li senditan trupon disbatis la pola militestro Ĵulkefski, kiu kun negranda taĉmento venis apud Moskvon. Samtempe en Moskvo popola ribelo detronigis Bazilon (1610-07-29), kiun la ribeluloj perforte monaĥigis; la bojara partio formis provizoran *Sepbojara regadon* (Семибоярщина), dum la popola partio de Zaharo Lapunov (Ляпуновъ) preparis eniron en Moskvon de la dua Falsdemetrio kaj liaj kozakoj.

Timante la kozakojn, la Sepbojara komitato (4 el kies anoj, cetere, estis gediminidoj) transdonis la urbon al Ĵulkefski, kondiĉe ke tiu ĝin defendos kontraŭ la Latrono.

Ĵulkefski tre lerte kondukis la interparolojn surbaze de la kondiĉoj por elekto de la reĝido Vladislavo ellaboritaj de la Tuŝinaj bojaroj kaj aprobitaj de Sigismundo. La moskvaj bojaroj faris nur kelkajn malliberalajn ŝanĝetojn; ili kunvenigis kelkajn troveblajn en Moskvo deputitojn de la Tutlanda Asembleo, kiuj do aprobis la elekton; Filareto, kiu reprenis sian antaŭan rangon de metropolito, kun kelkaj bojaroj iris al la sieĝata Smolensko por prezenti al Sigismundo la diplomon pri elekto de Vladislavo. Multaj urboj ĵuris fidelon al la caro Vladislavo Sigismundido (Владиславъ Жигимонтовичъ).

Kaj en Moskvo, kaj poste Ĵulkefski sin montris homo tre simpatia kaj takto-plena. Eĉ kun la maljuna patriarko Hermogeno, ortodoksa fundamentisto, restaĵo el la epoko de Johano la Timinda, li sukcesis amikiĝi kaj atingi reciprokajn respekton. Ŝajnis ke sian nekredible malfacilan mision li kondukis al feliĉa fino — sed lia tuta konstruaĵo estis bazita sur trompo. Meze de la intertraktado pri la kondiĉoj, dum kunsido de la Tutlanda Asembleo, li ricevis novan instrukcion de sia reĝo. Sigismundo ŝanĝis sian decidon, li rifuzis sendi la reĝidon, li decidis simple aneksi Rusion kaj regi ne kiel prizorganto de elektita caro, sed kiel konkerinto.

Ĵulkefski klare vidis nerealigeblon de tiu freneza plano, kaj silente ignoris la instrukcion; supozeble li esperis, ke la plenumitaj faktoj devigos la kontraktantojn respekti la realon.

Sekve de tio Sigismundo baldaŭ revokis Ĵulkefskion. La moskvanoj sincere bedaŭris tion. Sigismundo akceptis la hetmanon kolere, li malŝate forĵetis la prezentitan de tiu kontrakton, kaj diris: “Mi ne lasos mian filon esti moskva caro”.

Sigismundo postulis similan obeon de Filareto kaj aliaj moskvaj senditoj; tiuj rifuzis, kaj li arestis ilin kiel ribelulojn.

La novaj estroj de la pola garnizono en Moskvo estis pli obeemaj ol Ĵulkefski, kaj adoptis la konduton de konkerintoj; tio nature sekvigis ribelon; la pola garnizono incendiis la lignan urbegon, kaj profitante la konfuzon kune kun la bojaroj sin ŝlosis en la moskvaj fortikaĵoj. Ŝlosite kun la poloj, la patriarko Hermogeno tamen diskonigis al la regnantoj, ke li liberigas ilin je la ĵuro al Vladislavo.

La milito daŭris, sed Sigismundo restis implikita ĉe Smolensko, kaj neniam sukcesis malbloki la moskvan garnizonon.

Por aliancigi al si Prusion, Sigismundo konfidis al la Brandenburgia princo-elektisto administradon (1605) kaj poste la tronon (1611) de la Orienta Prusio, el kio rezultis persona unio de Brandenburgio kaj Prusio; antaŭ ol pasos du jarcentoj ĝi pereigos Pollandon.

La volontulaj armeoj

Intertempe je 1610-12-21 la duan Falsdemetrian mortigis lia tataro gvardiano (estis privata venĝo); tiu hazarda incidento iel resobrigis la socion, kiu ne plu cedis al la ĉarmo de la nomo (la tria Falsdemetrio estis tute malgrava epizodo). La civitanoj komencis arigi en volontulajn armeojn (ополчения) por rezisti al la prirabo fare de la kozakoj, poloj, dungosoldatoj, svedoj, krimanoj; por kunvenigi vere reprezentan Tutlandan Asembleon kaj elekti novan caron.

La dato omaĝata de ĉi tiu artikolo koncernas la Duan volontulan popolarmeon, organizitan de Niĵegoroda negocisto Kosmo Minido (Кузьма Мининъ, poste Козьма Миничъ) kaj princo Demetrio Poĵarskij (Пожарский). La iniciato estis de Kosmo, ankaŭ la invito de la princo estis lia ideo; Poĵarskij lasis sin persvadi, kondiĉe ke la organizajn kaj la financajn aferojn prizorgos Kosmo Minido, kiu ricevis mirindan titolon “De la tuta lando elektita homo”

(Выборный всею землёю человек). La kunlaboro de la du homoj, tiom malegalaj ordume, estis tre ŝoka por la aristokratoj, tamen tre sukcesa.

La movado havis ankaŭ reprezentan estraron, kiu iom post iom akceptis registarajn funkciojn, sed kiun oni ne rajtis nomi “assembleo” (соборъ, la sama vorto estas uzata por koncilio), ĉar la klerika ordumo en ĝi ne estis reprezentita. Tial oni nomis ĝin “Landa konsilio”, ruse *soveto* (совѣтъ), la eterna konstanto de la rusia historio.

La volontula armeo laŭbezone alianciĝis kun la kozakoj, sed ĝenerale tenis distancon rilate al ili. La dungosoldatojn ĝi tute ne akceptis (ankaŭ Marĵereto, kiu intertempe sin promociis ĝis la rango kolonela, ricevis rifuzon).

La plej grava batalo okazis je la 1a kaj 2a de septembro de la jaro 1612a, kontraŭ la trupoj de hetmano Ĥodkeviĉ (*Jan Chodkiewicz*), kiun Sigismundo estis sendinta por malbloki la polan garnizonon, kaj kiun la hetmano malgajnis. Perdinte la esperon ricevi helpon, la garnizono kapitulacis du monatojn pli malfrue, do post 19-monata sieĝo.

Modestaj kaj virtaj, kiel la Patroj-fondintoj de Usono, Kosmo Minido kaj Princo Pojarskij plenumis sian faron kaj revenis en sian privatan vivon, sen plenumi grandan krimon aŭ interesan eraron.

Konkludo

La Grandan Malordon kaŭzis koincido de pluraj katastrofoj, eksteraj kaj

internaj: la estingiĝo de la dinastio; la klimata katastrofo; la malstabilo kaŭzita de la reformoj kaj teroro de Johano la Timinda, precipe la egoismaj kvereloj en la reganta elito.

La lando estis grave vundita: eĉ 50 jarojn poste pluraj okcidentaj regionoj nombris nur duonon de sia antaŭa loĝantaro kaj ankoraŭ malpli grandan onon da plugita kamparo. La Moskva Regno perdis plurajn gravajn teritoriojn okcidente, inter ili la eliron al la Balta maro.

La lando perdis do la tutan 17an jarcenton. Nur Petro la Granda povis daŭrigi la reformojn komencitajn de Boriso Godunov.

Fine de la Granda Malordo la lando faris la saman elekton, kiel ĉe ties komenco: ĝi elektis same malaristokraton caron kiel Boriso, Miĥaelon Romanovon. La Romanovoj apartenis al la sama ŝtupo de la orduma hierarkio, la sola diferenco estis, ke ili estis malpli kapablaj intelektu. La terura krizo havis nenian rezulton — krom eble tiun, ke la bojaroj definitive perdis sian antaŭan rolon.

Glosaro

Demetri-ad-o-j. Militaj entreprenoj de parto de la pola nobelaro en la Moskva Regno dum la Granda malordo, pretestante subtenon de iu el la Falsdemetrioj (pole *Dymitriady*).

Endormiĝo de la Dipatrino. Ortodoksa festo respondanta al la katolika Ĉielenpreno, festata samtage (la 15an de septembro).

gedimin-id-o-j. (ruse гедиминовичи,

litove *Gedimainaičiai*) La posteuloj de la litova princo Gedimino (*Gediminas*).

Niĵegorod-o. La urbo en Rusio ĉe la enfluo de la rivero Okao al Volgo (ruse Нижний Новгород, adjektive нижегородский).

ord-um-o. En antikva aŭ feŭdisma socio, aparta socia grupo, kun heredaj aŭ korporaciaj leĝe fiksitaj devoj kaj rajtoj. — El la fontaj lingvoj de Esperanto nur la rusa posedas nemiskompreneblan terminon сословие; la ceteraj uzas vorton homoniman aŭ kun *ordo* — kaj tiel en la PIV-oj; aŭ kun *stato* — laŭ la latinaj modeloj *ordo, status*; greke *κατάλογος*). La PIV-a homonimio en racia lingvo ĝenas per si mem; ankoraŭ pli ĝenaj estas derivaĵoj, kiel *ordo de la orda socio* (ĉu сословие сословного общества aŭ *order of an orderly society*, ĉu iu el la du aliaj signifokombinoj?).

rurik-id-o-j (рюриковичи). Postuloj de Ruriko, la dinastio kiu regis la Kievan Regnon.

Sjever-i-o. La historia teritorio de la praa orientslava gento *sjeveroj* (сѣверъ) ĉe la limo de la nunaj Ukrainio, Rusio kaj Belorusio (la regionoj Ĉernihova, Orla, Kurska). El tiu lando devenas la protagonistoj de *La parolo pri la militiro Igora*. — Ruse Северская земля, ukraine Сіверщина, pole *Siewierszczyzna*.

Tutlanda Asembleo. En Rusio de la 16a–17a jc, kunveno de deputitoj (entute 400–500 homoj) el la ĉefaj ordumoj de la tuta regno (bojaroj, klerikoj, ŝtatservistoj, negocistoj), kunvokita por decidi pri grava demando politika (ruse Земский собор). — Marĵereto francigas la terminon per *les Etats du païs* (la Ordumoj de la lando, p. 21).

Vavel-o. Monteto en Krakovo sur kiu situas katedralo kaj reĝa palaco (pole *Wawel*).

Notoj

1. *Estat de l'empire de Rvssie, et grande dvché de Moscovie* par le Capitaine Margeret, à Paris, MDCLXIX.

2. S. Żółkiewski: *Początek i progres wojny Moskiewskiej*. (<http://rosja.osman.livenet.pl/zrodla/zolkiewski.pdf>)

3. Mi ne scias precize, kiel eraris Falsdemetrio; sed pri lia pola fianĉino Marina estas sciata, ke ŝi kisis la sanktajn bildojn sur la lipojn. Por ortodokso ikono prezentas sanktulon proksimume tiel, kiel por katoliko la papo reprezentas Kriston; sekve kisi la piedojn, la baskon aŭ la benantan manon estas kiel kisi la papan ŝuon. Estus skandalo se Marina kisis la papon en la buŝon.



Marjorie Boulton

Marjorie Boulton naskiĝis en majo 1924 kaj eklernis esperanton en 1949. Anglino, poeto, biografo kaj literatura kritikisto, ŝi estas unu el la plej grandaj Esperanto-aŭtoroj.

*Mi estas tri. La digna lektorino
kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
de l' dramo primitiva ŝi prelegas.*

*Dume, en koro, primitiva dramo
okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir' tortura.*

*La lektorino pensas. La virino
baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la poet', per arta disciplino,
observas ilin ambaŭ, kaj komentas.*

Ne malofte, poemoj de Boulton sukcesas naski komplikan rideton ĉe la leganto. Ŝi estas virino tenera, humana, kompatema. Ŝia riĉa interna vivo kaj ŝia persona marko malavare disfloras ĉiupoeme, kaj fakte ajna-ĝenre, ĉar temas pri viv-sinteno. Ŝiaj preferataj temoj estas la propraj spertoj kaj emocioj, kaj ankaŭ la konscio pri maljusto. Marjorie Boulton, virino ĉiusence granda, kaŝas sub aspekto milda kaj erudita pasian sensivon.

*Mia Dio,
mi povas esti idiota!
Kial mi prenis vian leteron,
kaj — ho konfeso!
ĝin kisis kun pasio!*

*Je mia aĝo,
per iluzio memhipnota,
nur kisi la paperon
kaj senti dum kareso
brulvundon sur vizaĝo!*

Nur ses jarojn post ŝia esperantistiĝo aperis la 286-paĝa poemaro *Kontralte* ĉe *Stafeto*. Tiam ŝi aĝis 31 jarojn kaj jam spertis pri publikigo sialingve: jen originala poemaro en la angla, jen tradukitaj poem-libroj el alilingvaj poetoj, jen kritikaj literatur-libroj. En *Kontralte* la aŭtora intelekto analizas pasiojn per poemoj navedaj inter la koro kaj la cerbo. La lingvaĵo ĉiam proksimas kaj tre komunikemas.

Meze inter la du ĉeflibroj de Boulton aperis *Cent ĝojkantoj*, aro da kurtaj poemoj forme perfektaj pri ĉiutagaj temoj tra simpatia lupeo. Kaj vera majstro-verko de minorra ĝenro.

*Erari estas home, ĉu ne?
Mi ne dezirus bati pune*



*presistojn, pro nur unu, du, tri
eraroj; ili povas nutri
la koron iom per ridetoj.
“La herbon manĝis multaj bretoj.”
“Sed la krimulo tuj foriris,
inter ĉefstrutoj li kuiris.”
“La pastro banis la geedzojn.”
“Ŝi havas multajn korp-bulecojn.”
Sed suspektigas pri komploto:
“Marjorie Boulton, nia pota.”*

Ankaŭ ĉe *Stafeto* aperis *Eroj* en 1959, kiam Boulton estis 35-jara. Jen pliaj 200 poemoj teme tre variaj (amo, libero, viv-respekto, esperantismo...). Ĉi libro markis la plenan artan maturecon de nia aŭtorino, kaj ĝi konsistigas unu el la plej bonaj originalaj poemaroj de la Esperanto-beleto.

Oni kutime ne citas Boulton kiel ampoeton. En diversaj lokoj, revuoj, antologioj ktp aperis poemoj de Boulton kiuj preskaŭ ĉiam rilatas al homaj sentoj tamen ne al amaj sentoj. Sed ŝi ja estas ankaŭ ampoeto. Longa nereciproka amo suferigis nian aŭtorinon kaj inspiris multajn ties versojn. Same en *Kontralte* kiel en *Eroj*, aperas serioj da ampoemoj sub la titoloj *La ora branĉo* kaj *Folioj de la ora branĉo*, eble la plej belaj el ŝia tuta produktado. Nereciproka amo, jes ja, ĉar ĝi vekas ĉe “la Amato”, kiu jam edzas, eventuale nur kompaton.

*Via hararo —
miraklo de ordinario...
Kisante ĝin
mi trovus ĝin altaro.
Viaj palpebroj...
nur personaj tenebroj...
Kisante ilin
mi trovus ilin mortigaj febroj.
Kaj viaj lipoj,
normalaj tipoj...
Sed kisante ilin
mi svenus sanga pro anĝelaj vipoj.*

Konjekteble, tiu longa amo difinis la tutan personeco-evoluon de Marjorie Boulton. Kaj tia fidela amo, tia persekuto de iluzioj, daŭris ne malpli ol kvin jarojn.

*Mi estas preterŝulde plene kvita.
Dekfoje pagis mi per tia pun'.*

ŝi diras en la *Adiaŭaj sonetoj*, kaze ke ŝi entute kulpis ion ajn. Sed ŝi sukcesas eltiri ion pozitivan:

*kvankam kruela estis la rimed',
profunde mi ellernis mian mion.*

Rimletoj — jen libreto kiu estas vera elmonro de lerto kaj talento — kvarmana! Sub rigor-formaj rondeloj, Marjorie Boulton kaj William Auld “duelas” kaj babilas laŭlonge de 84 rondel-poŝtkartoj kiujn ili interŝanĝis en 1953-54. Ili parolas i. a. pri arto, homa naturo, (mal)verkemo, religio, cenzo, eventuala postmorta vivo, la gepatra kaj esperanto, naciismo, edukado, amikeco, junula entuziasmo, E-(mal)movado... kaj meze de ĉio ĉi, ili rimportretas unu la alian! Leganto ofte ridetas, foje ridas, foje ekpensas...

Du el estas poemaro publikigita en 1985, kies unuan parton verkis Marjorie Boulton. Tiu triparta libro montras ĉefe psikan evoluon. La unua parto, *Mondrigarde*, ĝenerale pli pesimismas ol la junulaj verkoj; certe plu enestas strebo al justeco kaj kompatato al la doloroj en la mondo, sed la legado postlasas ian amaran guston, eble pro la neevitebla mikso de peniktuŝoj optimismaj kaj pesimismaj. Profunde impresas la neatendita krudeco de la tristega poemo *Okazis*.

La dua parto, *Ame*, rilatas al amo kalma, multe pli serena ol en la antaŭaj poemaroj, multe pli matura, sen tia forbruliga pasio de la juneco. Kaj serieto da *Specimenoj de modoj ampoeziaj* povas nur ĝojigi la leganton.

La tria parto, *Ridete*, realportas ne nur ridetojn sed foje ankaŭ ridegojn: katoj, esperantismo, bestfabeloj, ĉiutagaĵoj... denove plenaj de simpatio kaj surprizo.

Marjorie Boulton ĉiam estis tre katema — ŝi fakte prezidas la Kat-Amikaron — kaj kompreneble katoj rolas en ne pokaj ŝiaj poemoj. Kat-ŝatantoj eble eĉ pli frandus la poemojn leginte ankaŭ la ĉarman *Dek du piedetoj*, tutan proz-libreton pri katoj kun amuza anekdotaro el la unuaj kat-spertoj de la aŭtorino.

Antonio Valén

Kvazaŭ ĉio el paralela universo

Steele, Trevor. *Kvazaŭ ĉio dependus de mi: Romano*. — Antverpeno: FEL, 2009. — 343 p.

Kion mi legis? Eble biografion? La eldonejo anoncas, ke la “romano baziĝas grandparte sur la vivo de Carl von Ossietzky”. Fama foto el la koncertejo Esterwegen montras sur la kovrilpaĝo¹ memkontentan gvatiston kaj Ossietzky.

Aŭ ĉu mi legis romanon? La rakonto estas fikcia Erich Schwalbe, kiu naskiĝis en 1896 en Germanio kaj fuĝis de la nazia diktaturo al Aŭstralio. Post la falo de la Muro en Berlino, lia nepo demandas pri la germanaj radikoj de la avo. Kaj la avo rakontas pri sia plej bona amiko ekde la infanaĝo — Kurt Lenz, “forgesita heroo el epoko, kiam herooj grandparte mankis” (p. 12).

Trevor Steele kreas fikcian, paralelan historion. Ĉio el tiu mondo estas ebla historio, sed ne ĉio okazis (almenaŭ ne laŭ nia scio). Tio estas interesa por tiuj, kiuj kapablas disigi inter ambaŭ variantoj, sed konfuzas tiujn, kiuj ne havas detalan scion pri la epoko. Eĉ pli malbone estas, ke tiuj, kiuj ekinteresiĝas pri Ossietzky sen havi antaŭan scion pri li, tute ne havas gvidilon, kiam ili troviĝas en fikcio kaj kiam ne². Evidente Steele subtaksas la edukitecon de siaj legantoj, ĉar li spicas la tekston per piednotoj. Tiel li atentigas, ke Kant estas fama filozofo (p. 304) kaj ke en 1789 komenciĝis la franca revolucio (p. 207). Tiuj aĵoj, se ili entute necesas, aperu en la teksto.

La libro temas ankaŭ pri la epoko kaj ties istoj. Steele ŝatas ĵeti nomojn, ekzemple: “... li intervjuis aŭ almenaŭ alparolis Rosenberg, Streicher, Esser, Dinter, Frick, kaj Röhm” (p. 100). Bone, nun ni scias, ke Steele povas nomi fruajn naziojn, sed kion la leganto prenu de tio? Ili restas nur nomoj. Cetere: Steele profunde konas la epokon — sur ĉiu paĝo ni spertas, ke li abunde konatiĝis kun la idearo de tiu tempo. Evidente li eĉ traserferis la legadon de proto-nazia “sango kaj tero”-romano.

Ankaŭ la kontribuantoj de *Novaj Folioj* (la nomo de *Weltbühne* [Monda Scenejo]) en la romano neniam fariĝas vivaj personoj. Ofte ili estas enkondukitaj kvazaŭ suflorantoj por Kurt Lenz. Interesaj verkistoj kiel Tucholsky, Mehring aŭ Mühsam restas unudimensiaj roluloj. Steele ankaŭ celas negermanajn legantojn “kiuj probable ne multon scias” (p. 133) pri tiuj eventoj kaj “eble

bezonas iom da klarigo” (p. 91). Ili ne retrovas la etoson de tiu epoko en la romano, kiel ĝi eble aperas en *La pia danco*, ne tro bona libro de Klaus Mann.

Anstataŭ vivajn personojn ni havas debatojn. Kiam ajn ili renkontiĝas, ili debatas pri politiko. Ili apenaŭ havas vivon ekster la *Novaj Folioj*. Steele eĉ pardonpetas pri tio (p. 267 kaj 298). Mi pli volonte pardonus, se la politiko ne nur estus rekreo de vanaj debatoj, sed se ili ankaŭ reliefigus la vivon ekster la redakto. La redakto de *Novaj Folioj* aperas kiel ebura turo, kiu nur foje havas kontakton kun tendencoj en la tiutempa socio.

La du personoj, kiuj iom reliefigas en la libro estas Hitler kaj Kurt Lenz. Pri

Hitler ni lernas, ke li estas furzanta kukvoranto kaj hipnota deloganto. (Post 200 paĝoj ni jam scias, ke Hitler furzas kaj mi jam pensis, ke Steele estas iom tro obsedita de tiu difekto ĉe Hitler.) Sed Steele donas neniun klarigon por la fascino, kiun multaj (kaj ne nur) germanoj spertis tiutempe. Jes, Hitler nun aperas kiel ridinda ulo, sed de fikcia atestanto de la epoko mi atendas pli multavolan priskribon. La malo de Hitler estas Kurt Lenz. Lenz ne estas oratoro kiel Hitler, ĉar li balbutas³.

Do, mi emas rekomendi tiun libron kiel batalon inter du tendencoj. Unuflanke estas la intelektulo Kurt Lenz, kiu volas justan kaj solidaran socion, aliflanke Hitler — kruda potenco, avida je povo kaj preta uzi nudan brutalecon por akiri sian celon.

Eble ni lernu el tiu libro, ke spirito kaj intelekto, eĉ spritaj artikoloj ne sufiĉas, kiam tia minaco aperas.

Wolfgang Kirschstein

Notoj

1. Nur piednote: la kovrilo estas aparte aĉ-stila, inspirita de la flago de la nazia ŝtato. Espereble la eldonejo ne pagis por tiu dezajno.

2. La efiko de tiu tekniko estas potencie malkleriga. Ekzemple mi retrovis fikcian aserton el la romano *Darwin's Dreams* de Sean Hoade kiel fakton en popularsciencia artikolo.

3. Ĝenis min dum la legado daŭra atentigo pri t-tio k-kiam ajn L-lenz m-malfermis la b-buŝon.



Bibliografio de Máthé: Ĉu la plej granda Esperanto-libro?

(Ret-Info) Kiel rezulto de 20-jara sizifa laboro de d-ro Máthé Árpád, aperis en Budapeŝto *Bibliografio de Esperantaj periodaĵoj*. La datumbaza kolekto listigas 14 mil 173 Esperantogazetojn, revuojn kaj aliajn periodaĵojn ekde 1887 ĝis hodiaŭ, kun iliaj nomoj, eldonjaroj, redaktoroj, ĉefaj sciindaĵoj, ktp.

Ŝajne la libro estas unu el la plej “grandaj” Esperantaj libroj. Ĝi pezas 3,3 kilogramojn kaj enhavas 1155 paĝojn en formato A4!

La libron redaktis kaj kompilis en 99 %-oj d-ro Máthé, sed pro troa modesteco li ĉie antaŭensovas nomojn de aliaj kunlaborantoj (L. Yzal Hernández kaj A. M. Mole- ra). Por prizorgi kaj solvi problemojn de kompostado, eldonado, financado kaj distribuado helpis la Budapeŝta E-Centro *Eventoj*.

La Bibliografio en papera formo aperis nur en 30 ekzempleroj, ĉefe por eniri la registradan sistemon de sciencaj verkoj, kaj por deponi ekzempleron en la plej grandaj bibliotekoj (ŝtataj kaj movadaĵ). La datumbazo aperas ankaŭ en pdf-formato, kiu ebligas rapidan serĉadon kaj trovon de unuopaj esprimoj.

Szilvási László



Verkistoj estas kuracistoj de la socio



Mo Yan, nobelpremiito pri literaturo en 2012

unuan Nobelpremion por ĉino. Tio signifas, ke ili ne kalkulas la premion por Gao Xingjian en 2000. Kaj ili forĝis ankaŭ la Pacpremion por Liu Xiabo en 2010, ĉar Liu estas por la potenculoj de la komunista ŝtato subfosanto de ilia ŝtata ordo. Ekde tiam frostas la rilatoj inter Norvegio kaj Ĉinio. Eble atribuo de la premio al verkisto ene de la sistemo senfrostigos la rilatojn inter ambaŭ landoj.

“Mo Yan”, — tiujn vortojn kun la signifo “ne parolu”, “ne malkaŝu viajn pensojn kiam vi estas ekstere” diris la gepatroj al sia filo, naskita kiel Guan Moye. Kiam la frenezajoj de la “kultura revolucio” furiozis en Ĉinio, li devis forlasi la lernejon kaj labori en kamparo kaj poste en fabrikoj. La komunistoj sub la gvidado de Mao Zedong opiniis, ke tia okupado estas pli eduka ol lernejo. Kiam li estis 20-jara, li sukcesis aliĝi al la armeo, spite al antaŭa klasifiko kiel “malbona elemento”.

En la armeo li povis studi kaj tie li

fariĝis verkisto kun la pseŭdonimo Mo Yan.

Spertuloj pri la ĉina literaturo asertas, ke Mo malkaŝas la aĉajn aspektojn de la nuntempa ĉina socio, speciale per uzado de ruzaj personoj el la vasta folkloro. Tie liaj protagonistoj suferas senlime, kaj samtempe ankaŭ la povo de la tiranoj estas senlima.

Mo do kritikis, sed ne ribelas. Li estas dungito de la ŝtato kaj tiel li devas akcepti la regulojn de la Granda Frato. La reĝimo ja povas mordi, kiel Mo spertis en 1995. Tiam li verkis romanon, kiu ne plaĉis al la aŭtoritatoj kaj devis verki senkulpiĝon. Intertempe li estas tiel fama en Ĉinio, ke li ne plu timas la cenzuron. Probable li cenzuras sin mem kaj scias, kion li povas aŭdaci. Modesta kritiko estas pli bona ol neniu kritiko; la verkoj de tiuj, kiuj vivas ekster Ĉinio ne havas grandan eĥon en Ĉinio. Ni devus ankaŭ aŭdi tiujn, kiuj havas kritikan distancon kaj tamen restas en la sistemo.

Wolfgang Kirschstein

Ĉi-jare la Nobela komitato donacis al mi novan verkiston. Mi devus danki ilin pro atentigo pri tiu evidente interesa verkisto. Ofte oni konsideras nur tiujn verkistojn, kiuj vivas en iu okcidenta lando. Tial ideologio ankaŭ funkcias kiel ŝtopilo, kaj pro tio la verkoj de Mo Yan ne estas vaste konataj.

La ŝtataj amaskomunikiloj bonvenigas la premion por Mo Yan kiel la

Mo Yan

Lupo

La lupo fotis nian grasan porkon. Mi sciis, ke li portos la filmon al fotovendejo ĉe la pontokapo por proceziĝi ĝin, tial mi rapidis tien kaj atendis malantaŭ la pordo. Mia hundo estis malantaŭ mi, ĝiaj nukoharoj starigitaj, grumblo turniĝis en ĝia gorĝo. La komizo en la vendejo senpolvigante la vendejtablon ordonis al mi eligi la hundon de tie. “Nigrulo, — mi diris, — iru hejmen”. Kiam li obstine rifuzis, mi prenis lin ĉe la orelo kaj klopodis fortiri lin. La rezulto estis kolera mordo al mia pantalono. “Vidu, — mi diris al la komizo, montrante la truon en mia pantalono, — li ne iros”. Ŝi nur senvorte gapis al li. La lupo alvenis ĉirkaŭ la deka dum tiu mateno. Li transformis sin mem en helhaŭtan mezaĝan viron en blu-kakia tuniko, kiu ege paliĝis pro troa lavado. Spuroj de kreto sur la maniko indikis, ke li estis instruisto de matematiko en altlernejo. Sed mi sciis, ke estis lupo. Li povis transformi sin je iu ajn li deziris, sed li ne povis mistifiki min. Li kliniĝis super la vendotablo, prenis la filmon el sia poŝo kaj estis dononta ĝin al la komizo, kiam mia hundo atakis lin mordante

lian pugon. Ŝrika krio akriĝis el lia buŝo kaj lia dikfela vosto ŝveliĝis en lia pantalono. Sed tio malfortiĝis preskaŭ subite. La kapablo trankviliĝi tiom rapide indikis, ke liaj taoismaj praktikoj jam estis treege evoluintaj. Mia hundo lasis lin kaj forkuris kaj mi rapidis por kapti la filmon el lia mano. Tio kaŭzis alarmitan gapon kaj krion de la komizo: “Kion vi imagas al vi mem, fari tian kaprican akrobataĵon?” — “Li estas lupo”, — mi ekkriis. Ĝi reagis ŝajnigante la aspekton de iu malbone traktita kun iuspeca amara rideto kaj etendis siajn manojn por pruvi senkulpon de la akuzo kaj senpovon por refuti ĝin. “Redonu la filmon”, — postulis la komizo, sed tiam li jam iris el la pordo kaj mi sciis, ke li malaperos sen spure atinginte la eksteran pordon. Kiel atendite, la strato estis dezerta, neniu animo videblis.

Kiam mi revenis hejmen, nia porko kuŝis tie kun ŝire malfermita ventro, danke al tiu lupo. Mia hundo, grave vundita, kaŭris en la angulo kaj hurlitis lekante siajn vundojn.

El la angla elĉinigo de Howard Goldblatt tradukis **Wolfgang Kirschstein**





Literatura konkurso Liro-2012

Post unujara paŭzo (2011) *La Ondo de Esperanto* denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro*. Ĉi-jare estas proponitaj du originalaj kaj du tradukaj branĉoj:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduko el la angla: *The man who would manage* de Jerome K. Jerome
4. Traduko el la rusa: *Beglec* de Anton Ĉeĥov

En la originalaj branĉoj (1, 2) oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la tradukaj branĉoj (3, 4) — nur per unu verko.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2012.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2015 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*

Ricevitaj libroj

Bulgakov, Miĥail. *Hunda koro* / Tradukis el la rusa Klara Ilutoviĉ. *Fatalaj ovoj* / Tradukis el la rusa Ludmila Novikova. — M.: Impeto, 2012. — 184 p.; 400 ekz. — [Aĉeto].

Parzyszek, Jarosław. *Doktryna Zamenhofa*. — Zielona Góra: Ogólnopolski Komitet Studenckich Kół Esperanckich, 1987. — 8 p., 500 ekz. — (Materiały szkoleniowe Studenckiego Ruchu Esperanckiego). — [Donaco de Paweł Janowczyk].

Reza, Jasmina. *Arto*: [Teatraĵo] / Tradukis el la franca ILO. — Thaumiers: La KancerKliniko, 2011. — 31 p. — [Donaco de *La KancerKliniko*].

Steele, Trevor. *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*: Romano. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2009. — 343 p. — [Recenzoekzemplero].

Эсперанто с Юлио Багу: Рассказы = Baghy, Julio. *Rakontoj* / Пособие подготовила Ирина Кротова. — М.: Восточная книга, 2012. — 240 с.; 1000 экз. — (Метод обучающего чтения Ильи Франка) — [Donaco de Anatolij Sidorov].

Ricevitaj gazetoj

Bulteno de la Esperantista Klubo en Prago, 2012/2; Esperanto en Danio, 2012/4; Esperanto en Skotlando, 2012/199; Esperanto, 2012/9; Ĝenerala Informilo, 2012/174; KAE-Informilo, 2012/80; La Brita Esperantisto, 2012/973; La Gazeto, 2012/161; La Lanterno Azia, 2012/8-9; La Ondo de Esperanto, 2012/10; La Revuo Orienta, 2012/8-9.

**La abontarifo
de *La Ondo de Esperanto* en 2013
denove restas la sama. Tuj (re)abonu!**

La nova *Scienca Revuo*

La estraro de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista) decidis renovigi ties organon *Scienca Revuo*. Plu aperos kvar numeroj jare. Tiuj numeroj aperos nur en la reto, kaj jarfine publikigos libroforma jarvolumo. Ĝi estos kunmeto de la kvar numeroj kaj enhavos terminologiokolekton. Por ricevi la jarvolumon, ne necesas membriĝi en ISAE. Male, por aboni *Scienca Revuo* kaj akiri alirrajton al la kvar numeroj dum la jaro, oni devas membriĝi en ISAE.

La retejo de *Scienca Revuo* baziĝos sur malfermfonta sistemo jam uzita alilingve por revua eldono. ISAE nuntempe elprovas la sistemon kaj pli kaj pli tradukas el naciaj lingvoj al Esperanto. La retejo de *Scienca Revuo* estas:

<http://scienca-revuo.info>

Ĉiu ajn povas registriĝi ĉe la retejo. En ĝi troveblas la arkivoj de la revuo ekde la jaro 1949 kaj la terminologio de la unuopaj artikoloj ekde la jaro 2012. Dum la du unuaj jaroj de publikigado, la artikoloj estos alireblaj nur por la pagintaj membroj de ISAE. Poste ili eniros la senpagan arkivon, kaj estos haveblaj al ĉiu ajn. La terminologiokolektoj estos ĉiam kaj por ĉiuj tute senpagaj.

Johannes Mueller, la nova redaktoro de *Scienca Revuo*, skribas, ke la revuo havos terminologian sekcion, kiun prizorgos Mélanie Maradan. En la rubriko “Scienco kaj Esperanto” temos pri ajna rilato de scienco kun Esperanto, ekzemple, prezento de famaj sciencistoj esperantistaj, gravaj sciencaj verkoj en Esperanto. Alia nova rubriko estos “Scienco kaj socio”. Ĝi okupiĝos pri la influo, kiun scienco havas al la socio kaj inverse. Ekzemplaj temoj estas “nuklea energio”, “genteknologio” ktp.

Laŭ *Scienca Revuo*, 2012, №1.

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la julia Sudoku venis 13 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Renato Nunes Bastos (Brazilo), Anne George, Edmund Grimley Evans (Britio), Edeltraut Henning (Germanio), Jackie Huberdeau (Francio), Edith Schönwälder (Hispanio), Gianfranco Vignando (Italio), Jadwiga Benicka, Dorota Burchardt, Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Vladimir Vyčegjanin (Ruslando), Roland Larsson (Svedio). La loto donis libropremion al **Renato Nunes Bastos**, kiun ni kore gratulas!

Malnovaj taskoj

Ĉi-sube ni proponas al vi plian faskon da taskoj, publikigitaj en *La Ondo* antaŭ cent jaroj.

1. Al unua celas ĉiu, Dua estas inter montoj; Jen — la tuto, kreskas kiu En arbaro apud fonto.
 2. Kun “a” mi estas fiŝo, kun “i” — armaĵo.
 3. En la sekvantaj vortoj ŝanĝu po unu litero por ricevi novajn vortojn. La trovotaj literoj donos nomon de fama esperantisto: *maco, cerbo, kateno, fago, dento, horo*.
 4. Kun “r” mi estas malamiko de homoj, sed kun “k” mi fariĝas mia propra malamiko.
 5. L ab u aroaroaro mismis tere.
 6. Kio ĝi estas: ne vivulo, sed kreskas?
 7. Kiel granda estas mi litero Elemento estas mia ero!
- La solvoj devas veni al la redakcio antaŭ la 10a de januaro 2013.

Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ne maltrafu altnivele, aŭ: Vizitenda klubo

Kiam ni vizitis la Grupejon la vendredon 15-an de junio, estis agrabla surprizo: Ni povis unuafaje supreniri ĝis nia etaĝo per la nova lifto. Jen alia kialo por viziti nian sidejon. (*Nia Ponto*, 2012, №3, p. 3.)

Pruvita tempojaĝo

Venis en mian posedon ... fotoj pri Zamenhof ... en Kopenhago en la parko Tivoli la 28-an de Aŭgusto 2008... (Peter Weide, 13 okt 2012, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 21913)

Kiom kostis?, aŭ: Aprezu la prezon

... ankoraŭ el la malsanulejo li donacis la Hermann-Schmid-prezon por la plej sukcesinta partoprenanto en por-junulara Esperanto-kurso. (Rudolf Fischer. *Hermann-Schmid // Esperanto aktuell*, 2011, №2, p. 14; rimarkis Ionel Oneț)

Per ekskremento al eminento

Al la lernantoj de la perfekiga kurso (James Vasco Milanez, 20 sep 2004, yahoo-grupo unicamp-esperanto, mesaĝo 736)

Besteca konkurenco

La jena poemo gajnis la unuan premion en la Belartaj Kokursoj de UEA... (Hektor Alos, Kiril Velkov. *Ek al leg'!*: Kajero dua, Sofio: Bulgara E-Asocio, 1991, p. 64.)

Civite kaj arjanisme

La hungara estas la plej parolata ne arja lingvo sur la eŭropa kontinento. (Internacia Konferenco de Finn-Ugraj Popoloj, HeKo 514 5-A, 6 sep 2012, esperantio.net/index.php?id=2010)

Finnugra interpunkcio

Hungaroj, finnoj, estonoj, mordvoj, ceremisoj, sirjenoj kaj aliaj faros la punkton pri la situacio de sia popolaro, politike kulture ekonomi [tiele]. (samloke)

Meksika interpunkcio

En la nuna numero de “NI ĈIUJ”, ni trakas la trian punkton... (*Ni Ĉiuj*: Revuo de Meksika Esperanto Federacio // 2010/1, p. 2)

Vanas vok' al Jerevano

Eo havas nek armeno nek ... entreprenegoj malantaŭ si... (Andrea Fontana, 17 mar 2012, yahoo-grupo scienca-kaj-faka-agado, mesaĝo 1030)

Plukis István Ertl

Por via agendo.

Krozante rete tra la mondo oni foje trovas Esperanto-lokojn, kiuj ne aperas en Esperantaj jarlibroj kaj adresaroj. Kaj se vi planas krozi ne virtuale, sed reale, notu en via vojaĝ-agendo la hostelon *Esperanto* en la Ekvadora marurbo Montañita (<http://www.esperantohostal.com/>) je triminuta promendistanco de la plaĝo, kaj la hotelon-restoracion *Esperanto* (<http://www.hotel-esperanto.pl/>) en la Pollanda urbo Świdnica je cento da paŝoj de la strato Esperantystów.

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

- Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza
- Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg
- Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
- Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF
- Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE
- Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia
- Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady
- Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø
- Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602
- Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki
- Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris
- Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz
- Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell
- Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest
- Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W
- Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík
- Italio:** IEF, Via Viloresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste
- Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042
- Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08204 Sabadell
- Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703
- Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb
- Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)
- Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga
- Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C
- Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos, Av. 523, No.187, 1a Seccion de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero México D.F., CP 07969
- Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
- Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo
- Nov-Zelando:** G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630
- Pollando:** PEA, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa
- Portugallio:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa
- Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205
- Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd
- Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin
- Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441
- Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå
- Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen
- Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Germanio. La partoprenantoj de ĉi-jara EMA (vd. p. 7) konatiĝis kun la tre bela kaj interesa pejzaĝo de la apudrejna regiono de Kaub ĝis Rüdeseheim, kun multaj kasteloj, larĝaj surdeklivaj vinberkampoj, profundaj arbaroj... Sur la foto: Rejno vidata el la kastelo Rheinstein. (Petro Chrdle)



Pollando. ARKONES (vd. p. 6) delonge famiĝis kiel renkontiĝo kun pluraj interesaj programeroj klerigaj, sciencaj kaj kulturaj. Inter artistoj, kiuj ĉiuseptembre venas al Poznano, estas la sveda poeto Jarlo Martelmonto, kiu ankaŭ ĉi-foje prezentis novan spektaklon. (Joanna Filipowicz-Choroszuca)



Esperanto-urbo. La 26an de julio, kiam Esperanto iĝis 125-jara pluraj esperantistoj, iliaj familianoj kaj amikoj kunvenis en la ĝardeno de la Interkultura Centro Herzberg (vd. p. 5) por amike kunfesti la jubileon. Por la kunvenintoj kantis la nova muzika grupo *Senlime*. (Zsófia Kóródy)

HISTORIO

DE ESPERANTO




Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
360 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo